

HORIZONTO

I-a JARO N-o 1
JANUARO - FEBRUARO 1976

KULTURA KAJ INFORMA REVUO



ZARAGOZA
NASKIĜURBO DE
HORIZONTO

LA FUNDAMENTO DE ESPERANTO

KIEL NEPRIĜIS...

UNUECO ESTAS FORTO

DE LA NEŬTRALA ESPERANTO MOVADO

HORIZONTO

Direktorino
Inés Gastón

Redakta Komitato
Fernando de Diego
Juan Régulo
Jean Thierry

Red. kaj Adm.
Inés Gastón
P.º Marina Moreno, 35
Telf. (976) 22.05.21
Zaragoza-1 (Hispanujo)

Eldonkvanto 1.000 ekzempleroj

Dumonata revuo

Presita en Zaragoza
ĉe "Tipografía C. Boloix"
str. Reina Fabiola, 7, Zaragoza-8

Leĝa Deponejo Z-133-76

N.º 1 — Enero-Febrero — 1976

ENHAVO

PRESENTIGO

Nia Celo (Inés Gastón)
Kial nepriĝis la nova periodaĵo
"HORIZONTO"? (Jean Thierry)

UNUECO ESTAS FORTO

La Agad-grupoj de la Neŭtrala Esperanto-
Movado

EL NIAJ AGAD-GRUPOJ

Danlando (Mogens Rude Andersen)
Francujo (Jean Thierry)
Germanujo FR
Grekujo

ESPLORO KAJ DOKUMENTADO

Redaktas (Ivo Lapenna)

EL NIAJ FAKAJ ORGANIZAJOJ

Alvoko al Juristoj

"LA FUNDAMENTO DE ESPERANTO"

Prelego (R. Haupenthal)

BELETRO

Pri la Fonto de Valkluzo (trad. G. Warin-
ghien)

Kanto al la Agrokulturo... (trad. F. de
Diego)

La Reĝo Maĉjo la Unua (trad. Isaj
Dratwer)

KION VI NE LEGOS ALILOKE

Publikaj demandoj... (Ivo Lapenna)

Faktoj pri la membraro, financoj kaj la-
boro (Ivo Lapenna)

Fantaziaĵoj (A. Bourdeaux)

REVUO DE LA REVUOJ

Komentas (F. de Diego)

Ek-sturmas... D-ro Bormann (J. Thierry)

MALLONGE

PERANTOJ

Aŭstrujo:

Dro. Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020
GRAZ. Pĉk. Graz 1257.845. Jarabono:
160,— S.

Danlando:

Peter Zacho, Amosevej 5 A, DK-2700
BRØNSHØJ. Bank-konto, 354-800-468, Biku-
ben Jernbanalle 34, Zanløse. Jarabono:
60,— D Kr.

Francujo:

André Bourdeaux, 91 rue de la Chapelle,
F-75018 PARIS. Pĉk. Paris 21.670.96 V.
Jarabono: 40,— Fr.

FR Germanujo:

Irmtraud Haupenthal, Franz-Schubert-Str.
26, D-6602 DUDWEILER. Pĉk. Saarbrücken
15293-667. Jarabono: 24,— DM.

Grekujo:

K. G. Eliopulos, 130 El. Venizelos Ave.,
NEA SMIRNI —Attiki—. Bank-konto Nro.
040-753362-40, Nacia Banko de Greklando
Eolu-str. Jarabono: 300,— Grekaj Drakmoj.

Hispanujo:

Inés Gastón, P.º Marina Moreno, 35, ZARA-
GOZA-1. Pĉk. Zaragoza 00428398. Jarabo-
no: 500,— Ptoj.

Italujo:

Giannantonio Fiorini, Corso Venezia 9/h
I-37100 VERONA.

Kanado:

Kriss Smilga, 34 Martin Road. TORONTO,
Ont. M4S 2V2.

Luksemburgo:

Albert Wickler, 17 rue St. Laurent,
LORENTZWEILER.

Nederlando:

Marianne Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70,
NL-3002 ROTTERDAM. Jarabono: 25,— gld.

Rumanujo:

Mihail Petre Dungeanu, P.O. Box 502
R-5806 SUCEAVA

El ĉiuj aliaj landoj oni pagu al unu el
tiuj perantoj, ĝis peranto en tiu lando
estos trovita. Personoj pretaj funkcii kiel
perantoj, bv. sin turni al la direktorino.

Periode aperigi revuon, kiu elmontru nian kulturon kaj disvastigu nian humanecan spiriton, ne estas facila tasko.

La Esperanto-Movado travivas epokon ege malfacilan en mondo dividita kaj ŝtreĉita.

Ĉiu homa interkomunikado implicas konscian aŭ nekonscian transsendon de ideoj, kaj reagon de akcepto, rifuzo, simpatio, protesto... Ne estas facila tasko aperigi interesan revuon, super ĉio, interesan revuon por ĉies intelekto. La aŭtoro, pere de sia artikolo, devas transsendi al la leganto sian mesaĝon, elverŝi siajn sentojn kaj ideojn per vortoj; tia maniere, la leganto interesiĝas pri problemoj, kiuj ankaŭ lin koncernas, kaj tiu kono de la problemoj instigas lin al plulaborado.

Redaktoro de revuo estas devigata informi, sed por ke lia informado estu objektiva, li mem devas esti bone informita pri la temoj, kiuj rekte koncernas la legantojn. Tial, la gvidantoj de nia movado devus liveri ĉian informan materialon kiam oni petas de ili klarigon pri temoj pritraktitaj en gvidaj kunvenoj. Nei tiun informon al la membroj, kiujn ili reprezentas, estas agi kontraŭ la plej elementa homa rajto. Tial, estas plej bedaŭrinde konstati ke en la Esperanto-Movado tio okazas, ĉu pro nebonvolemo aŭ simple pro ne kompetenteco de la gvidantoj.

Aperigi ĉi tiun novan revuon ni decidis pensante pri vi, pri la tutmonda esperantistaro, kiu meritas kaj rajtas esti bone informita same tiel pri la evoluo de la lingvo kaj sekve de ĝiaj eblecoj kaj ankaŭ pri nia kulturo, kiel pri la diversaj okazaĵoj interne de la Esperanto-Movado.

Per "Horizonto", kultura kaj informa revuo de la neŭtrala Esperanto-movado, kies celo estas ne servi aliajn interesojn ol tiujn devenantajn de humaneca internaciismo, kiu inspiris al Dro. Zamenhof la kreadon de la neŭtrala Internacia Lingvo Esperanto, ni alfrontas la taskon. Verdire, por ni, ĝi ne estas tiel malfacila, ĉar ni kalkulas pri la kunlaboro de plej elstaraj esperantistoj: Prof. Gaston Waringhien, Prof. Dro. Ivo Lapenna, Dro. Klaus Perko, Drino. Clelia Conterno, Sro. Reinhard Haupenthal, Mag. Isaj Dratwer, Sro. Salvador Gumá, Sro. Víctor L. Cao, Sro. Gabriel Mora i Arana, Sro. Helmut Sonnabend, Sro. Peter Zacho, Sro. André Bourdeaux... al kiuj ni tre kore dankas. Speciale ni dankas al la Unua Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, kiu akceptis la revuon "Horizonto" kiel senkompromisan laŭparolilon de sendependa neŭtraleko kaj sentinelon de ties principoj.

Ĉiuj temoj, kiujn ni preparis por ĉi tiu numero same kiel tiuj, kiuj aperos en la venontaj numeroj, estas de daŭra valoro, ĉar ĉiuj estas esence homaj. En la venontaj numeroj ni inaŭguros pliajn rubrikojn same kulturajn kiel informajn. Inter ili estos ankaŭ "Dialogo kun la legantoj". Ni klopodos, ke la revuo estu inda je sia celo kaj por tio tre interesas nin via opinio.

Jen la debuto de "Horizonto": ni kalkulas je favora reago en ĉiuj medioj, kiuj konscias, ke la internacia neŭtrala Esperanto-Movado devas rekonfirmi sian ekziston.

Por ni estas tre grava via interesiĝo, via morala apogo, viaj sugestoj... kaj kial ne tion diri?: ankaŭ via materia subteno.

Antaŭ ol fini mi deziras kore danki al ĉiuj, kiuj fidis je nia laboro kaj abonis la revuon jam antaŭ ĝia apero.

Denove, dankon al ĉiuj!

Inés Gastón

KIAL NEPRIGIS LA NOVA PERIODAĴO "HORIZONTO" ?

En "Konkludoj" el "Raporto de la Estraro" (1974/75) la nova ĝenerala sekretario de U.E.A. skribis: "*Kiel sekvon de la intensa polemikado antaŭ Hamburgo kaj de la vasta pritraktado de la problemoj dum la U.K., la nova Estraro atendis la normalan cedon de la malplimulto al la plimulto, kiel decas en demokratia organizaĵo*" (substreko nia).

Nu, ĝuste tiel, kvankam li mem rekonas, ke antaŭ Hamburgo okazis "*intensa polemikado*" (verdire: eĉ sekreta manipulado, kiun pruvas la dokumento "HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO"), s-ro E. L. M. Wensing afektas kredigi, ke U.E.A. restis "*demokratia organizaĵo*". Kaj li preskaŭ miregus pro tio, kion li nomas "*agitado de la nova opozicio*", sed kio estas nur normala, morala kaj jura rajto de esprimado kaj informado pri la demokratia rompo kaj la perdo de neŭtraleco en U.E.A.

Venas poste la konfeso, ke la Estraro "*interalie ne ebligis, ke la revuo de la Asocio estu la tereno de senfina ĉeno de polemikadoj*", alivorte cenzuris ĉion opozician, ĉiun objektivan prezenton de faktoj! Jen senhonte klara recepto: unu vi per mensogoj estigas konflikton por ekkapti la povon, kaj poste vi —same perforte— ĉesigas ĉian konflikto-spuron por kredigi, ke ties kaŭzo konsistis nur en unu homo. Sed... Eĉ se temus nur pri tiu unu persono, kies grandegajn meritojn por Esperanto kaj U.E.A. eĉ la plej engaĝigitaj komplotintoj ankoraŭ ne kuraĝis ne rekoni, la hontindaj atakoj kontraŭ li plene pravigus la indignon kaj reagojn de ĉiu honesta persono en la Esperanto-Movado kaj ekster ĝi. Sed... Temas verfakte pri fundamentaj principoj: ĉu demokratiko kaj neŭtraleco daŭre regos aŭ ne en U.E.A.? Kaj ĉiu membro povas en tiu rilato prijuĝi la valoron de la cenzura "motivo": ja ne riskas ŝpruci konflikto en la revuo, se buŝumon portas "opozicio"! Eĉ pri tio sufiĉas legi la konsilon de Lenin mem, ke oni forprenu de la "*klas-malamiko*" ĉian rimedon influi la amasojn...; alidire: oni rifuzu ĉian rajton al la opozicioj!

Bedaŭrinde jes, tia estas la nuna situacio — kreita ne de ni, sed de la nova gvidantaro en U.E.A. — ke ĝi neprigis la organizigon de la apogantoj de la Neŭtrala Esperanto-Movado, por ke ili havu la eblon aŭdigi sian voĉon. Temas ja malpli pri "*skismo*" aŭ "*konkurenca organizaĵo*" (kiel jam provis alarmi la politikaj puĉistoj!), ol pri la simpla, natura, homa rajto esprimi kaj konigi sian opinion, almenaŭ en Esperantio efektivegi laŭ la "*piaj deziroj*" de la Konferenco de Helsinki la liberan cirkuladon de la ideoj kaj homoj; temas ankaŭ pri plua progresigo de Esperanto — kion la nuna gvidantaro tute neglektis. Oni legu pri tio interalie el la VIII-a ĉapitro INFORMADO: "*Raporto de la kompetenta estrarano ne atingis min.*"

Kio efektive estos agad-grupo de la Neŭtrala Esperanto-Movado? Ĝi estiĝos mem surloke el la renkontiĝo de almenaŭ du se ne pluraj sinceraj SAM-IDE-ANOJ, kiujn rilatigos formale per aparta statuto aŭ (eĉ sen formalajoj) interne de "*jam ekzistantaj Esperanto-organizaĵoj*" ilia fideleco al la "*neŭtrale-homa kultura karaktero de la Zamenhofa Esperanto*" kaj al la "*la humaneca internaciismo esence ligita al ĝi*"; — ĝin karakterizos la plena akcepto de la "Deklaro de Principoj" farita en la I-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado; — ĝin kunligos al la aliaj samprincipaj la voĉo de "Horizonto".

Tiel fondiĝis "HORIZONTO" kiel informilo, kies alvokiteco estas antaŭ ĉio konsistigi internacian forumon por la neŭtrale-homa tradicio de Esperanto. En ĝi pluraj rubrikoj sinsekve pritraktos: — la lingvo-problemon en la mondo; — dialogon kun elstara persono (esperantisto aŭ ne); — magazinon pri diversaj mondaj novaĵoj; — literaturan kajeron kun intervjuoj, recenzoj, noveletoj, felietonoj, k.s.; — informojn el la internacia Esperanto-parolanta komunado (interalie tion, kion ne diras al vi aliaj "laŭnormigitaj" gazetoj!); — dialogojn kun legantoj, eĉ kun asociaj gvidantoj sub kondiĉo de reciproka publikigo en la propraj gazetoj; — humuraĵojn, reklamojn kaj anoncojn.

Estimataj legontoj, "*la nuna totaleca cenzurado de la vero en la organoj de U.E.A. kaj en pluraj aliaj satelitaj periodaĵoj*" kaŭzis la dezirindan estiĝon de ĉi tiu nova periodaĵo; ni estas certaj, ke ĉiuj sinceraj kaj konsciaj esperantistoj donos al ĝi senrezerve la plej favoran akcepton.

Jean Thierry

LA AGAD-GRUPOJ DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Post la Unua Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, okazinta fine de la pasinta aŭgusto, pluraj aktivuloj komprenis, ke tie estis fondita nova organizaĵo kaj volis aliĝi. Aliaj, same kiel kelkaj partoprenintoj de la Konferenco, esprimis la deziron, ke tia organizaĵo estu fondita kiel eble plej baldaŭ. Por eviti kian ajn miskomprenon necesas doni jenajn klarigojn:

En Saarbrücken la tuta situacio estis atente prilumita el ĉiuj flankoj kaj estis decidite ne fondi en la nuna stadio novan organizaĵon, sed aktivigi ĉiujn fortojn de la partipolitike neŭtrala Esperanto-Movado kun du ĉefaj celoj: (I) evidenti interne de la Esperanto-Movado kaj ekster ĝi, ke, distinge de la politikiginta UEA, ekzistas vivanta, partipolitike neŭtrala Esperanto-Movado, kiu estas regata de neniua partio, dependas de neniua ekstermovada financa aŭ alispeca forto, kaj agas sole por la disvastigo de la Internacia Lingvo; (II) labori pozitive konforme al la *Deklaro de Principoj* (publikigita sur k. p...) ĉu en la kadro de UEA, ĉu ekster tiu kadro. Kial ĉu... ĉu? Tial, ĉar troveblas sincere pozitivaj elementoj, kiuj ankoraŭ kredas, eble iom tro optimisme, ke ekzistas almenaŭ eta ebleco reestabli en UEA mem la antaŭhamburgajn neŭtralecon, internan demokratecon kaj dececon, dum aliaj estas konvinkitaj, ke UEA kiel monda reprezenta organizaĵo de la neŭtrala Esperanto-Movado estas definitive finita. Ambaŭ starpunktoj devas esti respektataj, sed nur kondiĉe ke la principoj entenataj en la *Deklaro de Principoj* estu senkompromise akceptitaj kaj aplikataj.

Diference de *The British Esperantist* (unu el la gazetoj aktive kunhelpintaj la politikan konspiron), kiu jam en la aprila numero de 1973 lanĉis la sloganon "unueco estas morto" (p. 75), kaj kiu ekde tiam senĉese agis laŭ ĝi, la sinceraj esperantistoj fidis kaj plu fidis, ke unueco ja estas forto. Eĉ pli: ĝi estas necesega por sukcesa progresigo de la lingvo. Sed unueco, kiel ĝi estis konstruata kaj flegata antaŭ Hamburgo, povas esti bazita nur sur partipolitika neŭtraleco. Bedaŭrinde, per siaj kontraŭneŭtralecaj agoj la hamburgaj ekgintoj detruis ĝin. Nun ĝi devas kaj povas esti reestablita tra la agadgrupoj de la Neŭtrala Esperanto-Movado kun la helpo de *Horizonto* kiel kunliga kaj harmoniiga organo. Ju pli baldaŭ des pli bone.

Kiel, do, agi?

Evidente, oni devas agi sur la loka, landa, regiona kaj internacia niveloj. Sur

la loka nivelo eĉ nur 2-3 personoj povas facile formi agadgrupon kaj tuj eklabori laŭ la *Deklaro de Principoj*, precipe per informado kaj instruado. Ne necesas ia statuto, sed pli grandaj agadgrupoj povas organiziĝi ankaŭ formale, surbaze de statuto. La ekzistantaj lokaj Esperanto-societoj povas tutsimple eksplicite deklari sin agadgrupoj kaj plu labori aŭ eklabori laŭ la samaj principoj. Agadgrupo, aŭ eĉ unusola membro, povas labori por la celoj de la Neŭtrala Esperanto-Movado en la sino mem de ekzistanta loka societo, se por kiu ajn kaŭzo tiu societo ne deziras eksplicite deklari sin agadgrupo. Sur la landa nivelo adekvate aplikigas la sama metodo, sed pli vaste, nome por la tuta teritorio. Krome, la landaj agadgrupoj devus prizorgi la kunligon de la lokaj agadgrupoj kaj la formigon de novaj. Nenio malhelpas, ke kreiĝu regiona agadgrupo por pluraj landoj, se la intereso de la Neŭtrala Esperanto-Movado postulas tion. Fine, la internacia agadgrupo kunordigas la agadojn kaj donas konsilojn pere de *Horizonto*, kaj organizas la internaciajn konferencojn de la Neŭtrala Esperanto-Movado. En tiu ĉi jaro la franca agadgrupo, kiu jam formale organiziĝis kiel "Centro de Esploroj por la Progresigo de Esperanto", estas komisiita funkcii kiel internacia agadgrupo.

Ĉiuj agadgrupoj mem havigas la necesajn financajn rimedojn por sia laboro, dum la aktivuloj ne nur abonas la revuon *Horizonto*, sed ankaŭ instigas al la abonado kaj vaste diskonigas ĝian enhavon. Krome, ĉiuj agadgrupoj daŭre evidentiĝadu kaj per eksplicitaj deklaroj kaj per sia praktika laboro, ke la Esperanto-Movado devas ne esti identigita kun la politikiginta UEA aŭ kun kiu ajn alia ne-neŭtrala Esperanto-organizaĵo, sed ke ekzistas ĉiurilate sendependa, vere *neŭtrala Esperanto-Movado*.

Pri ĉio rilate la formigon de la agadgrupoj oni bv. sin turni al la internacia agadgrupo je la adreso: Centro de Esploroj por la Progresigo de Esperanto, c/o S-ro Jean Thierry, 5 rue Léon Cogniet, F-75017 Paris, Francio. Konkizajn informojn pri konkretaj atingoj oni bv. sendi al la redakcio.

*Internacia Agadgrupo
Redakcio de Horizonto*

EL NIAJ AGAD-GRUPOJ

Danlando

"POR KE LA LINGVO ESTU TUTMONDA, NE SUFIĈAS NUR NOMI ĜIN TIA."

Tiun grandan veron D-ro Zamenhof skribigis sur la titolpaĝo de la unua lernolibro de Esperanto.

Nun, preskaŭ 100 jarojn poste, mi kune kun centoj da aliaj esperantistoj diras: "*Por ke UEA estu neŭtrala, ne sufiĉas nur nomi ĝin tia!*" En la ĉiutaga agado la instancoj de UEA devas montri kaj defendi tiun neŭtralecon. Se ne, oni kiel struto enŝovas sian kapon en la sablon, kaj tiel fermas la okulojn antaŭ la faktoj.

Por multaj esperantistoj en la tuta mondo estis ŝoko giganta ekscii pri la kontraŭstatutaj okazintaĵoj, kiuj kulminis dum la UK en Hamburgo en 1974. Nur malmulte oni informiĝis per la oficiala organo de UEA. Sed kvankam la kolonoj de "Esperanto" estis ŝlositaj por la prezidinto Ivo Lapenna kaj por aliaj altrangaj funkciuloj en la Movado, kiuj levis siajn protestajn voĉojn, multaj esperantistoj tamen iom post iom bone komprenis/komprenas/komprenos, ke tiuj personoj *ne sen gravaj kaŭzoj* sentis sin devigitaj forlasi siajn postenojn.

La nuna UEA silentas, sed samtempe *perdas centojn da membroj!*

Tial esperantistoj, kiuj intencas teni UEA sur ĝiaj statutoj, en aŭgusto 1975 en Saarbrücken okazigis la *1-an Internacian Konferencon de la Neŭtrala Esperanto-Movado*, kiu akceptis la aldonitan "*Deklaron de principoj*". Okaze de tiu konferenco fondiĝis *agadgrupoj* en diversaj lokoj kaj landoj. Dum kunveno en septembro 1975 en Kopenhago ankaŭ fondiĝis *dana agadgrupo*, kiu kunvenas ĉiun duan mardon en *Kulturvets bibliotek*, Hausergade 3, (kontakto: Peter Zacho, Amosevej 5 A, 2700 København Brh., telf. (02) 91.16.93).

Tiuj agadgrupoj ne intencas esti ia "konkurenco" al aliaj instancoj, sed nur deziras daŭrigi la Esperantan laboron laŭ la ĝishamburgaj principoj, ĉar kiel jam dirite:

"Por ke UEA estu neŭtrala, ne sufiĉas nur nomi ĝin tia."

Mogens Rude Andersen

Francujo

FONDIGO DE LA FRANCA AGAD-GRUPO KAJ PREPARO DE LA 2-a INTERNACIA KONFERENCO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

La 6-an de novembro 1975 en Parizo estis fondita "Le Centre d'Etudes pour la Promotion de l'Espéranto" (La Centro de Esploroj por la Progresigo de Esperanto - C.E.P.E.), kiu "*havas la celon, laŭ la artikolo 1-a de sia statuto, disvastigi la instruadon kaj uzadon de la Lingvo Internacia, pli konata sub la nomo Esperanto... mallonge ĝin konigi kaj uzigi*".

Ĉu tio signifas, ke simple temas pri plia asocio destinita por duobligi jam ekzistantajn organizaĵojn? Ne.

Sed tiuj ekzistantaj organizaĵoj elektis esti popolamasa movado kaj multo da ili emas integriĝi al ideologiaj movadoj malpropraj al Esperantismo.

La Centro de Esploroj, igante sia la "Deklaro-n de Principoj" faritan de La 1-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, en la Universitato de Saarbrücken (1975), nepre precizigas la propran karakteron de sia agado kiel fokuson de riprenoj kaj proponoj klopodantaj por montri, ke la lingva problemo tiel monda kiel eŭropa iĝas pli kaj pli kriza spite la elturnaĵojn per kiuj oni sinsekve pretendis ĝin solvi: la imperiista unulingvismo de unu nacia lingvo privilegiita — kiu hieraŭ vane provis sin maski malantaŭ ia fasado de dulingvismo alvenanta al la bedaŭrindaj konstatoj de la "frangla" — unu plian fojon hodiaŭ alcelas ankoraŭ pli kamufli sin sub ia utopia plurlingvismo.

La Centro de Esploroj por la "*defendo kaj ilustrado*" de unu komuna lingvo vere internacia "*laŭ konsisto kaj destino*", konscia pri la fakto, ke la sociaj vivofortoj kolektiĝas sur la nivelo de la intelektaj elitoj kaj mezaj klasoj, strebas por specife orienti sian agadon en la soci-kulturajn mediojn de la diversaj kluboj, meze de kiaj vere ellaboriĝas la fundamentaj donitaĵoj de la morgaŭa socio.

La prioritata celo de la Centro estas organizi La 2-an Internacian Konferencon de la Neŭtrala Esperanto-Movado, kiu okazos de la 1-a ĝis la 7-a de aŭgusto 1976 en Parizo.

La ĉeftemo de ĉi tiu konferenco, kiu krom vizitoj kaj ekskursoj en kaj ĉirkaŭ Parizo konsistos el laborrondoj kaj pluraj prelegoj de konataj geesperantistoj, estis fiksita: "La Lingvo Internacia Esperanto, ĝia tradicio, ĝia komunajo kaj kulturo."

Jean Thierry

ALTIGI LA LINGVAN NIVELON

La Pedagogia Seminario okazinta de 1975-12-27 ĝis 1976-01-03, organizita de Sarlanda Esperanto-Ligo en kunlaboro kun lokaj esperantistoj de la seminaria urbo Neustadt/Weinstr., FRG, pritraktinte en tri preleg-serioj pri

- a) Esperanta literatur-didaktiko (Reinhard Haupenthal);
- b) Esperanta parol-arto: enkonduko en la retorikon (Prof. D-ro Ivo Lapenna);
- c) Kiel lingvolerne profiti de la legado (Jean Thierry)

venis surbaze de ampleksaj diskutoj pri tiuj temoj al la jenaj

KONKLUDOJ:

- 1) La antaŭenigo de Esperanto esence dependas de kiel eble plej alta lingvo-nivelo de la tuta Esperanto-parolanta komunajo.
- 2) Konstanta utiligo de la lingvo kaj pliperfektigo en la lingvo estas la antaŭkondiĉo de plua progresado.
- 3) La ekzistantaj Esperanto-organizaĵoj kaj tute speciale la agad-grupoj de la neŭtrala Esperanto-movado faru sian eblon por establi kursojn, en kiuj oni okupiĝu pri la perfektigo en la parola lingvo inkluzive la publikan parol-arton, pri la enkonduko en la literaturon de Esperanto pere de sistema legado kaj literaturaj kursoj.
- 4) Pro la granda influo de la Esperanto-periodaĵoj je la lingvo-uzo kaj la konstatita fakto, ke multaj el ili grave neglektas la korektecon de la lingvo, la redaktoroj konsciigu pri sia respondeco kaj klopodu publikigi siajn periodaĵojn en maksimume modela lingvo.

Grekujo

NOVA AGADGRUPO

S-ro Lic. K. G. Eliopulos informas nin pri la fondiĝo en Grekujo de forta agadgrupo kun landa komitato, kiu entuziasme laboras kaj de kiu ni multe esperas.

II^a INTERNACIA KONFERENCŬ DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Okazonta en PARIZO
(Francujo)

1 - 7 aŭgusto 1976

Placo de Tertre



Parizo, sidejo de ĉies artoj, kie floras ĉiuj ideoj, ĉiam estis kaj restas kiel krisolo de humanismo kie formiĝas sinsekvaj generacioj alvenantaj el plej diversaj landoj.

En la norda parto de Parizo situas Montmartre, altira kvartalo fama pro sia loĝantaro de artistoj; alvenante al la placo de Tertre oni sentas impreson jam de longe koni ĝin, kvankam neniam antaŭe oni ĝin vizitis.

ESPLORO KAJ DOKUMENTADO

Redaktas Prof. D-ro Ivo Lapenna

N-ro 1.

1.1 *Malapero de CED kaj celo de tiu ĉi rubriko*

CED — Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo — estis fondita la 1-an de januaro 1952 kiel institucio de UEA. Ĝia baza celo estis esplori ĉiujn aspektojn de la lingva problemoj kaj aperte pledadi por la Internacia Lingvo per dokumentitaj faktoj kaj science bazitaj argumentoj. Per minimumaj financaj rimedoj ĝi efike plenumis sian rolon. Centoj da dokumentoj, publikigitaj en Esperanto kaj en la angla, en kelkaj kazoj ankaŭ en aliaj lingvoj, pluraj libroj kaj la periodaĵo *La Monda Lingvo-Problemo* multe kontribuis al disvastigo de la lingvo kaj al altigo de la prestiĝo de la Esperanto-Movado. La krono de ĝia laboro estas la 844-paĝa verkego *Esperanto en Perspektivo: Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo* (fine de 1974), en kiu troviĝas ankaŭ koncizaj informoj pri la agadoj de CED en ĉap. 21.4.

Bedaŭrinde, rezulte de la hamburgaj eventoj ankaŭ CED ĉesis funkcii. Tio, kion la nuna gvidantaro de UEA ankoraŭ nomas CED, estas ne nur rekte kontraŭa al la strukturo, celoj kaj realigoj de la originala CED, sed ankaŭ grave danĝera por la interesoj de la Internacia Lingvo.

Kiel vidiĝas el la Raporto pri CED por 1974/75, CED ĉesis okupiĝi pri kolekto kaj katalogado de dokumentoj, verkado de studoj kaj artikoloj, kunmetado de statistikoj, publikigado de la regulaj CED-dokumentoj. Laŭ la Laborplano por la Kontraŭrasisma Jardeko, akceptita de la Komitato en Hamburgo, CED devis entrepreni esplorojn, studojn kaj enketojn pri lingvo kaj rasismo (v. 2.3.1 kaj 2.3.2 de la Plano, publikigita en n-ro 5/1974 de *Esperanto*), sed ankaŭ tiurilate nenio estas farita. Tre multaj sindonaj esperantistoj siatempe donacis multajn librojn kaj materialojn por la Universala Ekspozicio de CED, dum la subskribinto mem oferis amason da tempo kaj energio por ĝin formi. Nun tiu valorega kolekto, per si mem dokumentego pri la Esperanta kulturo, estas senrespondece vendata, eble jam vendita.

Eĉ pli negativa ol neniofarado estas la Raporto "La Estonteco de CED" de la 20-a de marto 1975. Parte insulta por la antaŭhamburga CED kaj aliparte naive nescienca kaj fantazia, ĝi en ĉiu okazo definitive sigelas la sorton de CED senigante la neŭtralan Esperanto-Movadon de bone funkciinta scienca institucio: se la proponoj en la Raporto ne realiĝos (plej verŝajne), do okazos nenio; se ili realiĝus eĉ partete (plej nekredeble), do CED fariĝus iaspeca nova IALA kun ĉiuj malutilaj sekvoj por Esperanto. Tion montras ankaŭ la Raporto pri kunveno de 29.07.1975 sub la nomo de CED. Tie oni parolis pri "planlingvoj" kaj la ĉeestantoj eĉ diskutis pri la "alternativo": "Ĉu CED estu institucio ĉefe pledanta por Esperanto, aŭ ĝi estu scienca institucio, kiu nur duagrade pledu por Esperanto kiel solvo de la lingva problemoj". Do: aperte pledadi por Esperanto surbaze de faktoj kaj scienca argumentado, kiel faradis CED ĝis Hamburgo, estas implicite "nescienca"; male, tre "science" estas ludadi interlingvistikon, kontraŭscience ne distingadi inter diversaj mortnaskitaj lingvoprojektoj, unuflanke, kaj nia vivanta Esperanto kun riĉa kultura enhavo, aliflanke, kaj nur kaŝe, preskaŭ honteme, "duagrade" pledadi por Esperanto. Tiu tuta interlingvistikomanio, abunde disvastiginta en tia kontraŭscienca formo tra la nuntempa Esperanto-Movado, estas per si mem malutilega por la Internacia Lingvo.

En tiaj kondiĉoj mi akceptis la proponon de la redakcio prizorgi tiun ĉi rubrikon. Kompreneble, ĝi neniel povos plenumi la ampleksajn taskojn, kiujn havis la ĝishamburga CED, sed ĝi almenaŭ klopodos iomete plenigi la ekestintan vakuon, por ke la laboro de multaj kompetentuloj dum tiom da jaroj ne estu perdita. En la rubriko regule aperados tre koncizaj informoj pri la plej ĉefaj aspektoj de la lingva problemoj kaj pri la plej esencaj dokumentoj rilate la Internacian Lingvon. La rubriko aperte kaj senkompromise, tute konforme al la karaktero de *Horizonto*, pledos por la Zamenhofa Esperanto kiel la sola vere lingvo kaj vere internacia el ĉiuj vidpunktoj: interna strukturo, socia portanto, celo kaj praktika apliko.

1.2 *Konsilo pri ĝisdatigado de EeP*

Okaze de la transdono de la arkivo de CED al la direktoro de la CO fine de 1974, mi sugestis, ke estontece la regulaj CED-dokumentoj estu eldonataj laŭ la ĉapitroj kaj iliaj subdividoj de *Esperanto en Perspektivo* (EeP), tiel ke tiu gravega verko estu daŭre ĝisdatigata. Tio estus doninta ankaŭ enspezon, ĉar tre kredeble la plimulto de la aĉetintoj de EeP volonte abonus tiajn dokumentojn. Bedaŭrinde, ankaŭ tiurilate nenio estas farita.

Restas, tamen, la ebleco, ke ĉiu posedanto de tiu verko, precipe la aktivuloj sur la kampo de informado, mem kompletigadu kaj ĝisdatigadu ĝin. Jen konsilo: Kiel eble plej dikan dosierujon oni dividu en 23 partojn laŭ la 23 ĉapitroj

de EeP; kiam ajn oni sciigas pri iu verko, studo, artikolo aŭ dokumento pri temo traktita en EeP, oni aŭ eltondu la koncernan tekston aŭ notu koncize sur aparta folio la titolon kaj esencan enhavon kun indiko kie troviĝas la tuta teksto; en ambaŭ kazoj oni indiku en la supra dekstra angulo la koncernajn ĉapitron, subĉapitron, sekcion kaj, eventuale, subsekcion laŭ la enhavtabelo de EeP, kaj enmetu la tekston aŭ noton en la ĝustan lokon de la dosierujo. Ekzemple, la tekston de la Leĝpropono n-ro 1667 de 16.05.1975 pri enkonduko de Esperanto kiel fakultativa lerobjekto en la francajn lernejojn, aperintan en pluraj periodaĵoj (interalie en *SAT-Amikaro* de decembro 1975) oni povas facile eltondi, signi per 4.6.2 kaj enmeti en parton 4 de la dosierujo. Alia ekzemplo: *Hamburgo en Retrospektivo* evidente ne povas esti metita en la dosierujon, sed oni povas fari noton kaj enmeti ĝin kiel 18.8 en parton 18; referenca noto kun signo 21.4 devus esti metita en parton 21 de la dosierujo.

Utiligante EeP por preparado de prelegoj, verkado de artikoloj aŭ similaj celoj oni ĉiam konsultu ankaŭ sian dosierujon por inkluzivigi la plej freŝdatajn faktojn.

1.3 Korekto de HeR

En la verko *Hamburgo en Retrospektivo: Dokumentoj kaj Materialoj pri la Kontraŭneŭtraleca Konspiro en UEA* (HeR) enŝteliĝis 2-3 eraretoj, el kiuj unu estas sufiĉe grava. Sur p. 44 estas dirite, ke en 1974, do en la decida jaro antaŭ Hamburgo, la Estraro de TEJO (junulara sekcio de UEA) konsistis el "prezidantino F. Szabó-Felső kaj vicprezidanto H. Eichhorn, ambaŭ aktivaj membroj de la komunista partio; alia vicprezidanto T. Jansson, ĝenerala sekretario R. Triolle, kasisto J. M. Liouville-Cash, ĉiuj minimume fortaj «simpatiantoj»". Per sia letero de 16.10.1975 s-ro T. Jansson atentigis min, ke li ne estis nur «simpatianto», sed ke ekde 1967 li «laboris/aktivis por la komunista partio en Svedio kaj organizaĵoj ligitaj al ĝi», kaj ke ekde 1969 li «estas aktiva membro de la sama partio». Tio signifas, ke en la antaŭhamburga periodo de la politika konspiro la prezidantino kaj ambaŭ vicprezidantoj estis aktivaj membroj de la komunista partio, kaj la ĝenerala sekretario kaj kasisto minimume "simpatiantoj". La posedantoj de HeR bv. korekti. La 1-2 aliaj korektoj, tute sensignifaj, kaj pluraj novaj faktoj kaj dokumentoj aperos en la dua eldono de la verko.

1.4 Peto al la redakcioj

La redakcioj de ĉiuj Esperanto-periodaĵoj estas petataj regule sendadi al la persona adreso de la subskribinto (77, Grasmere Avenue, Wembley, Middx. HA9 8TF, Britio) siajn publikajojn, por ke li povu sekvi la evoluon interne de la Esperanto-Movado kaj adekvate redaktadi tiun ĉi rubrikon.

1.5 Sekvanta numero

La sekvanta numero estos plene dediĉita al kelkaj lastatempaj ekzemploj de sukcesa argumentado por la Internacia Lingvo en diversaj landoj.

Ivo Lapenna

ALVOKOJ AL JURISTOJ

Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ) estas negranda, sed grava faka organizaĵo, sendependa kaj politike neŭtrala. Ĝia celo estas duobla: (1) disvastigi la Internacian Lingvon inter la juristoj, (2) utiligi la lingvon por fakaj, profesiaj kaj sciencaj celoj. La organo de la Asocio, *Internacia Jura Revuo*, aperas du fojojn jare kun varia faka enhavo, ĉefe en la sfero de kompara juro.

Ĉiuj personoj, kiuj diplomiĝis en jura fakultato aŭ samranga jura lernejo, kaj kiuj parolas la Internacian Lingvon, povas fariĝi regulaj membroj, dum studentoj kaj personoj laborantaj en juraj institucioj povas esti eksterordinaraj membroj. La jara kotizo por ĉiuj membroj estas 120 aŭstria ŝilingoj. Ĝi inkluzivas la abonon al *Internacia Jura Revuo*.

Mi afable alvokas ĉiujn kolegojn, kiuj plenumas la kondiĉoj por membreco, aliĝi al IEAJ kaj samtempe pagi la kotizon de 120 aŭstria ŝilingoj al provizora sekretario-kasisto Dro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio, poŝta ĉekkonto n-ro 1257.845. La kotizon en egalvaloro de 3 anglaj pundoj oni povas pagi ankaŭ je la nomo kaj adreso de la subskribinto (77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, HA9 8TF, Britio).

Prof. Dro Ivo Lapenna,
Prezidanto de IEAJ

Sarlanda Esperanto-Ligo solene festis la datrevenon de la naskiĝo de Dro. Zamenhof. En tiu okazo, S-ro Reinhard Haupenthal prelegis pri la ĉiam aktuala temo:

LA FUNDAMENTO DE ESPERANTO¹⁾

(Ĝia historio kaj signifo)

1. La leĝdona karaktero de la verko

En la punkto 4 de la Deklaracio pri la Esenco de la Esperantismo estas dirite:

“Esperanto havas neniun personan leĝdonanton kaj dependas de neniuj aparta homo. Ĉiuj opinioj kaj verkoj de la kreinto de Esperanto havas, simile al la opinioj kaj verkoj de ĉiu alia esperantisto, karakteron absolute *privatan* kaj por neniuj devigan. La sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo “Fundamento de Esperanto”, en kiu neniuj havas la rajton fari ŝanĝon. Se iu dekliniĝas de la reguloj kaj modeloj donitaj en la dirita verko, li neniam povas pravigi sin per la vortoj “tiel deziras aŭ konsilas la aŭtoro de Esperanto”. Ĉiun ideon, kiu ne povas esti oportune esprimata per tiu materialo, kiu troviĝas en la “Fundamento de Esperanto”, ĉiu esperantisto havas la rajton esprimi en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta, tiel same, kiel estas farate en ĉiu alia lingvo. Sed pro la plena unueco de la lingvo al ĉiuj esperantistoj estas rekomendate imitadi kiel eble plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto, kiu la plej multe laboris por kaj en Esperanto kaj la plej bone konas ĝian spiriton.”²⁾

Tiu teksto ne lasan ian malklaraĵon. La tuta sistemo de Esperanto baziĝas do sur la tri verkoj entenataj en la FdE, kiu por ĉiam restos la bazo de la lingvo.

Ĉar tio estas io tute unika en la historio de la planlingvoj — neniuj aliaj projektoj faris ion kompareblan kaj tiel facile klariĝas la mokemeco pri la “netuŝebleco” de la FdE — valoras iom penetri la historion de la verko.

2. La historio de la FdE

2.1. La akcepto en Bulonjo (1905)

Ni ne povas nun studi la antaŭhistorion de la tuta Deklaracio. La diversajn etapojn oni retrovas en la korespondoj kun Michaux (LZ I) aŭ, larĝe komentitaj, en la “Klariga notico” de Albault (FdE, p. 32-39). Finan fazon la Deklaracio atingis en la laborkunsidoj de la 1-a Universala Kongreso. La protokoloj notas por la unua kunsido de lundo, 1905-08-07: “D-ro Zamenhof legas poste sian deklaron, kies tekston ekzamenos la komitato, kaj al kiu la kongreso donos sian aprobon en unu el la venontaj kunsidoj.”³⁾

Pri la decida kvara kunsido (merkredo, 1905-08-09) la protokolo notas en la fino

(antaŭe Boirac legis la nomojn de la novaj LK-anoj, oni fiksas tempon kaj lokon por la 2-a UK, resendas la demandon pri la supersignitaj literoj al la LK, fiksas la detalojn pri la Esperanta flago kaj prokrastas la demandon pri la himno):

“D-ro Zamenhof levigas kaj petas, ke la Prezidanto legu je lia loko kaj je lia nomo la definitivan tekston de la Deklaracio, akceptitan en antaŭa konsilio de la oficistaro de la kongreso. Tiun legadon la kongreso salutas per entuziasmaj aplaŭdoj.

[...] Kortuŝata D-ro Zamenhof esprimas siajn dankojn al ĉiuj kaj certigas, ke tiu tago neniam forviŝigos el lia memoro. La kunsido estas finata je la dek-dua, meze de longaj, senfinaj, entuziasmaj aplaŭdoj kaj krioj:

Vivu Zamenhof!! — Vivu Esperanto!!”⁴⁾

Verŝajne la gravecon de la evento plene komprenis nur Zamenhof mem kiu neniam mergiĝis en la ĝeneralan entuziasmon de la amasoj.

2.2. La konsisto

La FdE konsistas el tri ĉefaj partoj:

1. la kvinlingva gramatiko (A F G R P);
2. la Ekzercaro;
3. la Universala Vortaro.

Krom tio fundamentan karakteron havas ankaŭ la antaŭparolo, kiel klare evidentiĝas el ties lasta alineo:

“La ideoj, kiujn mi supre esprimis pri la Fundamento de Esperanto, prezentas dume nur mian *privatan* opinion. Leĝan sankcion ili ricevos nur en tia okazo, se ili estos akceptitaj de la unua internacia kongreso de esperantistoj, al kiu tiu ĉi verko kune kun sia antaŭparolo estos prezentita.”⁵⁾

Efektive, ĝi entenas la tutan programon de la lingvo kaj koncize resumas la ĝistiaman (1905) tradicion kaj samtempe larĝe apertas futurajn eblojn. Valoras do iom detale analizi ĝin.

2.2.1. La antaŭparolo⁶⁾

La unua alineo pritraktas la neceson de la FdE kaj ĝian netuŝeblecon. Tiun principon de netuŝebleco Zamenhof esprimis jam tre frue. Jam en la *Aldono al la Dua Libro* (1888) Zamenhof diras:

“La lingvo internacia restas senŝanĝa en tiu formo, en kiu ĝi estas proponita de mi; fari en ĝi iajn laŭvolajn ŝanĝojn ni de nun jam ne havas la privilegion.”⁷⁾

La konkludon, ke, unu fojon komencinte reformojn, oni ruinigos komplete la ling-

von, ni povas, post historiaj spertoj nur plenekonfirmi. La historio de Ido kaj de la Esperantistoj de René de Saussure estas ilustraj ekzemploj por tio. Tio validas eĉ por la antaŭjara disputo pri niaj pasivaj participoj kaj la samo ripetigas nun en la paderbornaj frenezaĵoj (Helmar Frank).

La starigo de ia aparta FdE estas en si mem nenio nova, ĉar jam delonge ĝiaj tri eroj ekzistas kaj estas studataj. Tia bazo necesas por sana evoluo. Tion Zamenhof klarigas en sia tipe parabola lingvaĵo. Samtempe li koncedas, ke decidiga registara dekreto rajtos enporti ŝanĝojn en la lingvon. Celante ĉiam nur la akcepton de unu komuna lingvo li cedis ekz. al Javal ŝanĝojn, se tiu povus garantii, ke la franca registaro enkondukus la lingvon en la lernejojn.⁹ Tia koncedo, tamen, ŝajnas hodiaŭ eksmoda. Esperanto pretiĝis por sia solo kaj ĝi devas esti rigardata kiel aŭtonoma lingvo kaj ne kiel objekto libera por ĉies manipuloj.

La kvara alineo elmetas la dokumentan valoron de la FdE (jarojn poste Wüster kreos la esprimon "Systemkunde" por havi adekvatan ekvivalenton en la germana), kiu restigu eĉ erarojn (ekz. vipuro). Malgraŭ sia dokumenta valoro ĝi ne estas lernolibro, sed pli ĝuste ili baziĝu sur ĝin eksplikante. La apero de la FdE havis alian flankan efikon: la *Fundamenta Krestomatio* de la jaro 1903 perdis sian "leĝdonan" karakteron fariĝante nur "gvida".

De ĝeneralaj kondiĉoj Zamenhof transiras al la konkreta kazo asertante, ke la FdE ne malhelpas lingvan evoluon, sed male ĝin akcelas. Ĝi estas nur regulilo malhelpanta arbitran evoluon. Tamen la anoncita pli detala klarigado de la demando ne okazis en Bulonjo, sed prokrastiĝis al la reforma projekto de Zamenhof el 1907 (publikigita nur en 1948, en LZ II).

Efektive Zamenhof neniam tre detale elmetis la principon de arkaismoj — neologismoj (oni konas lian malinklinon al gramatika teorumado) tiel ke la FdE tro ludis rolon de fetiĉo ol de vera programo. Se li pli detale klarigadus tiun gravegan principon estus malfacile imagi la bojkoton kiun oni tra diversaj periodoj de Esperanto lanĉis kontraŭ la neologismoj, bojkoto ankoraŭ hodiaŭ sporade ekflamanta ie kaj tie.¹⁰

Tamen hodiaŭ, analizante la verkaron de Zamenhof, oni scias, ke li ĉiam *agis* laŭ tiu principo.

Al ia aŭtoritata institucio li cedis la rajton pri oficialigo de neologismoj, al kio dum longa tempo la Akademio limigis sian laboron.

Alieno 10, laŭ praktiko ŝatata de Zamenhof, resumas ĉion:

"Mi finas do per la jenaj vortoj:

1. pro la unueco de nia afero ĉiu bona esperantisto devas antaŭ ĉio bone koni la *fundamenton* de nia lingvo;

2. la fundamento de nia lingvo devas resti por ĉiam *netuŝebla*;
3. ĝis la tempo kiam aŭtoritata centra institucio decidus *pligrandigi* (neniam *ŝanĝi*!) la ĝisnunan fundamenton per oficialigo de novaj vortoj aŭ reguloj, ĉio bona, kio ne troviĝas en la "Fundamento de Esperanto", devas esti rigardata ne kiel deviga, sed nur kiel *rekomendata*."¹⁰

Tiuj principoj montriĝis senescepte ĝustaj kaj ni povas aserti, ke se en 1887 Zamenhof kreis kaj lanĉis la lingvon, li en 1905 donis al ĝi senmortecon. Tiusence Waringhien pravas dirante, ke Zamenhof "serĉis ian eksterordinaran rimedon por definitivigi la tiaman formon de la lingvo, ian artefaritan ekvivalenton de la tradicio, kiu konservas sensaĝe la naturajn lingvojn."¹¹ Kaj la sama Waringhien konkludas en la analizo de la historia aspekto de la FdE:

"Sed hodiaŭ, kvindek kvar jarojn post la Unua Kongreso, ni rajtas fieri, ke ni restis fidelaj al la leĝo de nia Majstro, kaj ni povas danki al li, ke E ne restis ia artefarita, arbitre ŝanĝebla kaj ĉiam rompebla mekanismo, sed definitive kaj neŝanceleble enradikiĝis en la viva penso de la homoj. Kaj tiun ĉi mirindan, ni ne timu diri eĉ miraklan, rezulton Zamenhof atingis, ne nur ĉar li posedis la necesajn lingvistikajn sciojn, sed krome, kaj precipe, ĉar li havis, tridek kelkajn jarojn antaŭ la oficiala scienco, tiun genian intuicion, ke lingvo estas antaŭ ĉio ia socia fenomeno kaj, kiel ĉiuj sociaj realaĵoj, baziĝas ne tiom sur fonetikaj leĝoj aŭ raciaj rezonoj, kiom sur kelke da profundaj sentoj, la sentoj pri imitema simpatio, pri kolektiva disciplino, pri grupa solidareco, kiuj havas sian radikon en la socia instinkto kaj sian floron en la konscio sub la formo de la interhoma amo."¹²

2.2.2. La kvinlingva gramatiko

Tiu parto estas la plej arkaa kaj retroiras al la Unuaj Libroj, de 1887 kun la evidenta celo imponi per facileco. El tia didaktika konsidero fontas la famaj 16 reguloj formantaj kvazaŭ gramatikan kvintesecon. Ilia traduko eniris en 1903 la Fundamentan Krestomation. La diferencojn kaj diverĝojn (en formo de plusoj kaj minusoj) montras la sinoptiko de Aibault en ties aparato al FdE.

De tie ĉi estos longa vojo al la *Plena Gramatiko* de Kalocsay kaj Waringhien.

2.2.3. La Ekzercaro

Ĝi havas iom longan historion. Ekzerca materialo (kvankam en tre magra dozo) troviĝis jam en la Unua Libro. En la Dua Libro (1888) aperas pra-Ekzercaro kaj unu fabelo de Andersen ("La Ombro"). Tiu unua Ekzercaro distingiĝas per sia tendenco al simpligoj: la frazoj estas pli mallongaj kun sintakso pli simpla. La elizioj de la artikolo estas forigitaj. La Ekzer-

caro entenas ĉefe banalajn frazojn, dum la Dua Libro "supozigas, ke la aŭtoro iom lasis elflui sian amarecon pri la malfacila vivo kaj la nejusteco de la homoj".¹³⁾

La nuna Ekzercaro aperis unuafoje ĉe Gins en Varsovio en 1894 (43 paĝoj, n-ro 72 de nia literaturo) portante kiel cenzuradon 1893-07-29. Dua eldono aperas en 1898, 3-a kaj 4-a (tipografie senŝanĝaj) en 1900 resp. 1904 ĉe Kelter, la postaj apartaj eldonoj ĉe Hachette en Parizo. La dua eldono enportas modifojn, precipe en la angla parto sen paralela modifo de la Universala Vortaro. Tio restigas malkonkordojn inter ambaŭ partoj kiujn cementigos la FdE, tiel ke la Universala Vortaro restas pli proksima al la Ekzercaro-eldono de 1894.

Rilate la instruan valoron de la Ekzercaro la ŝtupigitan gramatikan malfacilon montras la tabeloj de Albault (FdE, p. 306-308). La Ekzercaro tiel permesas kaj konkludojn pri la stilistiko de Esperanto kaj pri la kunteksta signifo de la vortoj, plia pruvo pri la nesuficeco de la 16 reguloj. Dank al la Ekzercaro estas ankaŭ evidente, ke ne eblas rigardi la regulojn izolitaj, sed nur lige kun la ilustra ekzerca materialo. Tiel ekz. solvante la t.n. ata/ita-problemon la Akademio ne povis sin limigi al la regulo 14, sed prave analizis la ekzemplan frazaron de la Ekzercaro.

Cetere, pli amuze ol serioze Butler en anglalingva artikolo faris kvazaŭ psikologian analizon de la frazoj por veni al konkludoj pri la... aŭtorino de la Ekzercaro. Multajn jarojn poste Waringhien alirigis ĝin per Esperanta traduko.¹⁴⁾

Por meti la Ekzercaron en ĝian historian ĉirkaŭaĵon jen fona teksto, siatempe preterlasita de Dietterle en OV, sed malkovrita de Paul Ciliga:

"Ĝis nun pri nia lingvo ekzistis nur sekaj gramatikoj kaj vortaroj [...]. Kiu volis lerni nian lingvon, devis aŭ simple ellerni la gramatikon kaj sekan amason da vortoj, aŭ preni ian libron, skribitan en nia lingvo, kaj tradukadi ĝin kun helpo de la komuna vortaro: libro por sistema lernado, por sinekzerçado — ne ekzistis. [...] Longe jam niaj amikoj plendis pri tio ĉi kaj longe jam ni volis eldoni tian libron, enhavantan sistemajn ekzercojn kun la traduko de la vortoj sub ĉiu paragrafo; sed du objektoj nin detenadis: a) la minacado de reformoj, kiuj promesadis fari la eldonotan ekzercaron tute sentaŭga tuj post ĝia eliro, kaj b) la manko de rimedoj."¹⁵⁾

2.2.4. La Universala Vortaro (UV)

Indikante kiel aperadon la jaron 1894, fakte UV jam aperis en Aŭgusto 1893 (la cenzur-dato estas 1893-06-30). Postaj eldonoj aperas en 1898, 1900, 1901 kaj 1904, ĉiuj en Varsovio. Al la ĉ. 920 radikoj de la Unua Libro UV aldonas ĉ. 1710 pliajn. Pri la vorttrezoro de la dokumento tamen necesas noti, ke jam en 1889 aperis *Meza Vortaro Internacia-Germuna*, kiu estas

preskaŭ tute identa kun la UV.¹⁶⁾ Kaj ankaŭ unu jaron pli frue, en 1888, la *Plena Vortaro Rusa-Internacia* entenas ĉ. 500 pliajn radikojn ne estantaj en UV kaj multajn derivaĵojn.¹⁷⁾

Ekde la dua eldono (1898) tra la Esperanta literaturo ekrapas la preserara *vipuro* (anstataŭ la ĝusta *vipero*).¹⁸⁾ La detalan analizon de la vort-materialo kun elmontro de la diversaj evoluetaĵoj plenumis Waringhien en *Lingvo kaj Vivo*.

En 1906 la Lingva Komitato decidis en la Geneva Kongreso entrepreni la revizion de la naciaj tradukoj de la UV. Tiu laboro daŭras ĝis 1914, sed, pro la eksplodo de la milito, la publikigo plu prokrastiĝas ĝis 1922/23.¹⁹⁾

3. La sinteno de Zamenhof

La fakto mem, ke Zamenhof iniciatis la solenan akcepton de la Fundamento kaj tion faris ĝuste kiam Esperanto transiris en fazon de praktika aplikado, dum kongresoj kaj renkontiĝoj, montras la gravecon kiun li atribuis al tiu kvazaŭ konstitucia verko. Jam dekomence li konsideris la Unuan Libron kiel fundamenton de la lingvo. Pro la larĝaj progresoj de Esperanto ekde 1900 kaj la favora situacio kreita de unua kongreso li kredis la tempon matura por certigi la estontecon de la lingvo per ekvivalento por la jarcenta patino de la etnaj lingvoj, povante sin bazi sur la jam firme ekzistanta tradicio ekestinta per "silenta interkonsento". La propran rilaton al la FdE Zamenhof jene formulas:

"Tiun ĉi tri verkojn la aŭtoro de Esperanto rigardadis ĉiam kiel *leĝojn* por li, kaj malgraŭ oftaj tentoj kaj deloj li neniam permesis al si (almenaŭ *konscie*) eĉ la plej malgrandan pekon kontraŭ tiuj ĉi leĝoj; li esperas, ke pro la bono de nia afero ankaŭ ĉiuj aliaj esperantistoj ĉiam rigardados tiujn ĉi tri verkojn kiel la solan leĝan kaj netuŝeblan fundamenton de Esperanto."²⁰⁾

En la posta tempo Zamenhof plurfoje revenas al la FdE kaj ties rolo: en cirkulero al la Lingva Komitato de 1907-12-20 (LZ II, p. 113) kaj en Cirkulera Letero al ĉiuj esperantistoj de 1908-01-18 en kiu li definitive rompis kun la Delegacio de Couturat. En konversacio kun Marie Hankel li emfazas la neceson pri konstanta legado de la FdE.²¹⁾ La antaŭmilita eldon-ritmo ŝajnas fakte atesti pli vastan recepcion ol nuntempe: inter 1905 kaj 1931 aperis 8 plenaj eldonoj (la 9-a komentariita de Albault eliris en 1963) plus 15 tradukitaj eldonoj al kiuj ankoraŭ en 1961 aldoniĝis indonezia.

Alia aspekto devas esti almenaŭ tuŝita, kvankam Zamenhof neniam publike ĝin aludis. Sciante la gravecon de la hebreeco de Zamenhof (de li mem plurfoje konfesis) oni ne povas ne konsenti la analogion kiun vidis Waringhien: same kiel la diasporajn judojn kuntenis la Malnova Testamento kiel komuna bazo de pluekzistado, tiel same la FdE servu kiel kuntenilo

de la Esperanto-Movado. Hodiaŭ ni scias, ke Zamenhof pravis.

4. *Bazo por la lingva evoluo*

La antaŭparolo dediĉas al tiu demando du alineojn:

“Mi diris, ke la fundamento de nia lingvo devas esti absolute netuŝebla, se eĉ ŝajnus al ni, ke tiu aŭ alia punkto estas sendube erara. Tio ĉi povus naski la penson, ke nia lingvo restos ĉiam rigida kaj neniam disvolviĝos... Ho, ne! Malgraŭ la severa netuŝebleco de la fundamento, nia lingvo havos la plenan eblon ne sole konstante riĉiĝadi, sed eĉ konstante *pliboniĝadi* kaj *perfektiĝadi*; la netuŝebleco de la fundamento nur garantios al ni konstante, ke tiu perfektigado farigados ne per arbitra, interbatala kaj ruiniga *rompado* kaj *ŝanĝado*, ne per nuligado aŭ sentaŭgigado de nia ĝisnuna literaturo, sed per vojo *natura*, senkonfuza kaj sendanĝera. ... *Riĉiĝadi* la lingvon per novaj vortoj oni povas jam nun...”²²⁾

Celo de la FdE do ne estas iĝi fetiĉo aŭ sankta libro, sed garantii la kontinuecon de la lingvo kaj gardi ĝin kontraŭ arbitraĵoj.

Pri la riĉigado de la lingvo per novaj vortoj Zamenhof jam en 1904, okaze de la apero de la “germanaj vortaroj” (de Jürgensen kaj Pagnier), disvolvas tri principojn:

- 1) leĝdonaj estas la vortoj de la UV;
- 2) akcepto de “internacia vortoj” (konforme al la regulo 15 de la gramatiko);
- 3) laŭokaza kreo de novaj vortoj por novaj bezonoj.

Zamenhof skizas la latentajn eblojn de la evoluipovo de Esperanto.

Necesas denove konsciiĝi al si, ke kiam Zamenhof skribis la antaŭparolon de la FdE li skribe skizis regulojn starigitajn kun la lingvokreo kaj montriĝintajn en preskaŭ 20-jara praktiko komplete ĝustaj. Kaj oni ne devas forgesi la eksperimentan fazon antaŭ 1887, kiam la lingvo jam prete vivis en la kapo de Zamenhof, trairinte stadiojn al kiuj refalos postaj planlingvoj. inkl. tiuj de la naturalisma skolo.

5. *Resumo*

El niaj konstatoj (el kiuj multaj eĉ restis nur ĉe la surfaco de la FdE) jam vidiĝas, kia kompleksa verko estas nia FdE. Mi opinias, ke hodiaŭ ne plu licas ĝin legi kun la naŭva sinteno de niaj antaŭuloj, sed pli kaj pli necesas ĝin saĝe trakompreni. Ju pli oni tion faros en la lumo de nia historio kaj sur la fono de la Zamenhofaj diroj kaj agoj, des malpli oni povos rifuzi sian admiron al la okulisto Zamenhof, kiu sola sukcesis krei lingvon kaj enblovi en ĝin la vivon.

La eldono de Albault prezentas por tiu saĝa trakompreno kaj por seriozaj studoj kaj esploroj ĉiujn helpajn aldonojn en formo de komentario, piednotoj, doku-

mentoj kaj bibliografio. Mi devas konfesi, ke ĝuste dank al tiuj kleraj garnaĵoj kaj ingrediencoj mi ne hezitis fari el la FdE unu el miaj Esperantaj brevieroĵoj.

NOTOJ

- ¹⁾ Prelego farita en la Zamenhof-festo de Sarlanda Esperanto-Ligo, 1975-12-14.
- ²⁾ FdE, p. 37.
Ni uzos ĉi-sekve jenajn mallongigojn:
FdE: Zamenhof, L. L.: *Fundamento de Esperanto*. 9.eld. kun Enkondukoj, Notoj kaj Lingvaj Rimarkoj de A. Albault. Marmande 1963. 355 p.
LZ Zamenhof, L. L.: *Leteroj. La tragedio de lia vivo rivelita de lia ĵus retrovita korespondo kun la francaj eminentuloj*. Prez. kaj kom. de G. Waringhien. Paris 1948. 2 vol. I. 1901-1906. XVII, 367 p. II. 1907-1914. XI, 372 p.
OV Zamenhof, L. L.: *Originala Verkaro*. Kol. kaj ord. de Joh. Dietterle. Leipzig 1929. 604 p.
PVZ Iam kompletigota verkaro de L. L. Zamenhof. Kioto 1973 k.s. Gis 1975 vol. 1-4.
- ³⁾ *Oficiala protokolaro de la unua kongreso universala de Esperanto en «Boulogne-sur-Mer»*. (Aŭgusto 1905). Paris 1905, p. 4; ankaŭ en: *Unua universala kongreso de Esperanto*. Paris 1905, p. 16. (Esperantista Dokumentaro. 1.)
- ⁴⁾ I.c., p. 13-14.
- ⁵⁾ FdE, p. 49.
- ⁶⁾ Detalan analizon de Albault «Plano kaj notoj pri la antaŭparolo» vd. FdE, p. 286-289.
- ⁷⁾ OV, p. 32; PVZ I, p. 92.
- ⁸⁾ Kp. Zamenhof, Lazaro Ludoviko: *Letero al Emile Javal (1905-09-24)* Saarbrücken 1973. (Faks. de la orig.)
- ⁹⁾ Kp. mian publikan leteron al Aŭstria Esperanto-Instituto, en: *Germana Esperanto Revuo* 20. 1967: 8/9, p. 90.
- ¹⁰⁾ FdE, p. 49.
- ¹¹⁾ Waringhien, Gaston: *Lingvo kaj Vivo*. La Laguna 1959, p. 85.
- ¹²⁾ I.c., p. 92.
- ¹³⁾ FdE, p. 15.
- ¹⁴⁾ An extraordinary and incomprehensible book. En: *The British Esperantist* 33. 1942: 445/46, p. 126-129. — Trad. de G. Waringhien: Libro eksterordinara kaj nekomprenebla. En: *Monda Kulturo* 2. 1965/66: 14, p. 135-137.
- ¹⁵⁾ *Esperantisto* 1894: 9(57), p. 130. *Franca Esperantisto* 29. 1961: 199, p. 50. Nun alirebla en PVZ III, p. 188-190.
- ¹⁶⁾ Vd. Reinhard Haupenthal: Komparo inter EGM kaj UV. En: *Scienca Revuo* 19. 1968: 74, p. 71-72.
- ¹⁷⁾ La sistempa traesploro de tiu rusa vortaro, se malatenti la Enciklopedion Vortaron de Wüster, estas farata nur en nia epoko. Kp. Naokazu Kawasaki: *Prefiksitaj vortoj el Zamenhof, Plena Vortaro Rusa-Internacia, 2-a eldono, 1896*. Osaka 1974. 84 kol. (Esperantologia Raporto de Kawasaki. 3.) sama: *Sufiksitaj vortoj el Zamenhof, Plena Vortaro Rusa-Internacia, 2-a eldono, 1896*. Osaka 1975. 9 fol. (Esperantologia Raporto de Kawasaki. 4.) — D. B. Gregor: La plej fruaj senafiksaj kunmetaĵoj en Esperanto. En: *Scienca Revuo* 25. 1974: 2/3 (106/107), p. 81-102.
- ¹⁸⁾ Kp. pri tio la resuman artikolon de A. Albault: La fundamenta serpento. En: *Scienca Revuo* 18. 1967: 3, p. 81-88.
- ¹⁹⁾ Kp. Th. Cart: *Korekto de la eraraj tradukoj en «Universala Vortaro» (kun aprobo de la Lingva Komitato)*. Paris, Berlin 1922-1923. 5 vol. — De tie la rezultoj eniras en E. Grosjean-Maupin: *Oficiala klasika libro de Esperanto*. Paris 1924. Kaj poste ili ĝeneraliĝas tra *Plena Vortaro de Esperanto*. Paris 1930. (8. eld. 1972.) — Kp. ankaŭ la aparaton de Albault en FdE.
- ²⁰⁾ FdE, p. 44.
- ²¹⁾ Kp. Walter Lippmann: *Dr. Zamenhofs sprachliche Gutachten*. Leipzig 1921, p. 8.
- ²²⁾ FdE, p. 47.

Pri la Fonto de Valkluzo

. I .

Val', kiu de lamentoj miaj plenas,
River', tro ofte ŝvela de ĉi larmoj,
Arbaraj bestoj, vagaj birdoj, svarmoj
Da fiŝoj, kiujn verdaj bordoj tenas,

Briz', kiu de l' ĝem-ardoj pli serenas,
Pad' milda, jam ŝajnanta dornogarnoj,
Monteto iam plaĉa, nun sen ĉarmoj,
Kien memor' kaj Amo min plu trenas,

Vin mi rekonas, ho pejzaĝ' kutima,
Ne min, ho ve! kiu el vivogaj'
Iĝis gastejo de dolor' senlima.

Tie mi vidis mian Bonon, kaj
De tie, nuda, ŝi ĉielen pasis,
Kiam en ter' la belan korpon lasis.

Francisko Petrarko (1304-1374)
el "Canzoniere" CCCI: Pri la morto
de mia Damo Laŭra

. II .

La ventoj mem, la ventoj aŭdataj softe spiri
Kaj inter tiuj ombroj kaj inter tiuj rokoj,
Ilin pliplaĉigante per ĉi amindaj voko,
Ja de Petrarko lernis kun tia bel' suspiri.

La ondoj mem, la ondoj aŭdataj flustre iri
Kun tiom da mildeco tra ĉi dezertaj lokoj
Imitas unu voĉon, ĉarmintan per kantlogoj,
Kaj memorigas, kiun li venis ĉi admiri.

Sur la terpeco, kie mi staras nun, birdaro
Apud ĉi klaraj akvoj ankoraŭ nun retrilas,
Kion diradis Laŭra al la fidela karo.

Ĉi tie, ha! nur flamo, ĉi tie nur amplejo;
Ĉio pri li parolas, ĉio pri ŝi babilas,
Kaj ombr' ilia vagas ancor' en ĉi ravejo.

Georgo de Scudéry (1601-1667)
Esperantigis
Gaston Waringhien

KANTO AL LA AGROKULTURO DE LA TROPIKA ZONO

ANDRES BELLO, fama literaturisto, filologo, juristo kaj politikisto naskiĝis en Caracas (Venezuelo) la 29-an de novembro de 1731, kaj mortis en Cilio la 15-an de oktobro de 1865. Fondis la universitaton de Santiago (ĉefurbo de Cilio), kaj liaj gravaj filologiaj studoj influis la evoluon de la hispana lingvo.

Kiel poeto, li precipe distingiĝis per sia elstara Kanto al la agrokulturo de la tropika zono, kies esperantan version mi donas ĉi-sube. La Kanto, forte influita de la stilo, la temoj kaj la retoriko de la antikvaj aŭtoroj latinaj —Ovidio, Vergilio, Cicerono, Livio, Horacio, Juvenalo— admonas al la junaj nacioj amerikaj, tiam apenaŭ liberiĝintaj el la hispana potenco, asimili la virtojn de la vivo kampara, doni sin al la fekunda laboro agrokultura, kaj ne atenti la falsan kaj koruptan logon de la urboj, la intrigojn de la politika ambicio kaj la pov-avidon de la tiranoj. Antaŭ la ruino kaj la mizero postlasitaj de la kruele longa milito inter Hispanio kaj ties amerikaj kolonioj, la admonoj, avertoj kaj konsilcoj de Bello —eĉ se nuraj reeĥoj de la grandaj temoj de la klasika literaturo— havis sencon kaj montris sekvindan vojon. Sed la historio decidis alie.

Al d-ro Rafael Caldera, eks-Prezidanto de la Respubliko de Venezuelo, aŭtoro de la grava biografio Andrés Bello, fervora admiranto kaj disĉiplo de la granda humanisto, tiel proksima al la idealoj de la esperantismo.

F. de Diego

Saluton, zon' feunda,
 kiu al suno vin amanta diras
 rondiri ĉirkaŭ vi; de vi naskata
 en ĉi vari' klimata,
 sub la karesa lumo ĉio spiras!
 Vi teksas al somero ties kronon
 el spikoj densa-grajnaj; kaj la uvon
 enŝutas en bol-kuvon;
 la fruktoj viaj havas ĉian tonon:
 en la ĝardeno brilas
 purpure, flave; kaj el ili spilas
 aromojn mil la ventoj;
 en nenombreblaj centoj
 ia gregoj paŝtas sin, de sur savano
 limanta kun la fora horizonto
 ĝis neirebla monto
 trempata ĉiam en pur-neĝa bano.
 La kanon vi produktas,
 kaj tiom ĝi dolĉegas,
 ke ĝi tutmonde sur mielo regas
 dum, en koralaj urnoj, beros fruktas*
 bolontaj ŝaŭme en plenplenaj taso;
 karmino svarmas sur nopal-padeloj,
 kaj ĉe ĝi, hontus eĉ purpur' de Tiro;
 indig-tinkturaĵoj de radiaj heloj
 rivalas la glimadon de safiro.
 Vi havas vinon, tial, ke agavo
 por la feliĉaj filoj
 de Anahŭako sangas; kaj folion*
 kiu, por via ravo,
 sin solvas fume en spiralaj iroj
 kaj distras vin en plaĉan inercion.
 Vi vestas per jasmeno
 l'arbuston el Ŝebao,*
 kies aromo ŝvebas en festenoj,
 kvietigante febron de Liao.*
 La palmo sen kompar', por viaj idoj,
 produktas plej varie,
 kaj ananas' odoras ambrozio;
 jukao jam maturas;
 enĝrunde la terpomoj sin kulturas;
 kaj el kotono per tre milda ŝiro
 neĝecajn flokojn blovas la zefiro.
 Al vi sin sternas pasifloroj sorĉaj
 inter la verdo, kiun frondoj tenas;
 de la sermentoj pendas kun langvoro
 ien globoj sukaj, jen franĝita floro;
 kaj la maizo, ĉefo fanfarona
 de la popolo spika, por vi grenas;
 por vi, bananoj prenas
 dikiĝe pezan ŝarĝon dolĉo-riĉan:
 banano, frukto trona,
 donac' unika, kiun la Fortuno
 disverŝis kun prodiga oportuno
 sur teron ekvatoran kaj feliĉan.
 Ne kaŭze de teknikoj
 la bananarboj kreskas bele, multas,
 kaj nek al serpo aŭ plugilo ŝuldas
 la pompon de spadikoj;
 sub etaj flegoj bananarbo fortas;
 post peza tasko, sklavo ilin faras;

rapide ĝi grandigas, laca mortas,
 sed jam arbidoj ĝiaj ĉirkaŭ staras.
 Sed, ve! ĉar, kvankam klaras,
 ke viaj teroj riĉas super ĉio,
 senlime favorataj de l' naturo,
 ia pigra loĝantar' alie statas.
 Ve! kial en postkuro
 de falsa ĝuo iri oni ŝatas,
 anstataŭ paŝi al feliĉo pura
 de simpla kamparano,
 for de la luks' kancera,
 de trompo kaj de vano,
 de naŭza urbo pigra kaj mizera?
 Pro kia fantazio
 la viroj, kiujn la Fortuno signis
 sinjoroj de ĉi tero riĉa, vasta,
 senzorge ĝin neglektas
 por la avid' mon-rasta,
 kaj al blindaj perturboj
 kaj al tumulta vivo sin direktas,
 al la mizeraj urboj
 de krima ambicio,
 kie batalas la civilaj bandoj
 kaj ŝajnas vana vorto la patrio;
 kie la luksaj moroj nin venenas,
 kaj la diboĉo ardas
 kaj la nespertan junon al si trenas?
 Junulo tie ne sin vire hardas,
 al trejnoj fortodonaj li ne penas;
 eĉ, li la sanon perdas en la brakoj
 de belulin' perfida
 vendanta sian korpon per aŭkcio;
 sed li imagas distro
 en ĉastan sinon meti tentojn fortajn
 per ia mispasio,
 aŭ sin dediĉi ĝis la hor' aŭrora
 al fiaj ludotabloj mizerportaj.
 Kaj dume, al la flirto senpudora
 de flata galantul' orelon klinas
 edzino, kaj la ĉasto
 de la filino dronas
 en la patrino skolo de diboĉo,
 ĉar ŝin precipe la ekzemplo spronas
 pli ol la urĝo de l' instinkto-voĉo.
 Ĉu tiel li sin forĝos por patrio
 en viron de heroo, nobla grando,
 en bazon kaj kolonon de la lando?
 Ĉu el tumulto de baĥanalio
 aŭ el danc-rondoj de obscena balo
 elvenos junularo purakora,
 fiero ĉampion' de dealo?
 Kiu per firma mano
 kapablus trudi juston de la leĝo,
 aŭ spite fronti en batalo riska
 la brilon de murdema ponard-eĝo,
 aŭ kun kuraĝ' oponi al regantoj
 de insolenta, tiraneca stilo,
 se jam en la lulilo
 li nokte dormis sub lascivaj kantoj
 kaj nune pudras sin kaj sin retuŝas
 kun zorgo virineca

kaj senokupe ĉiun tagon kuŝas
 aŭ travoluptas en amor' nedeca?
 Ne tiel traktis la venkinta Romo
 la artojn de milito kaj de paco:
 la kondukiloj de la ŝtato iris
 al la fortika mano,
 kiun plugilo kalis, sun' kuiris;
 kaj sub kampul-kabana pajl-tegmento
 edukis Romo filojn, kiuj tronis
 latinkuraĝe super ĉiu gento.
 Bonsorte vi naskiĝis, vi, sinjoroj
 de bela tero, kien la naturo
 sin verŝis tiel multe per favoroj,
 ke ŝajnas, ke ĝi volas vin alvoki
 per monro de belaĵoj ĝis saturo.
 Disrompu jam la sorĉon,
 kiu katenas vin al urba muro.
 La grupoj metiistaj art-konstruaj,
 la komercistoj, kiuj lukson vendas
 vivante sibiritaj,
 la alkurantoj al logilo strasa
 de altaj rangoj kaj honoroj bruaj,
 la bandoj de flatistoj parazitaj,
 en la ĥaoso putra plu baraktu.
 Sed vi heredis ruron: ĝin kontaktu.
 Ĉu vi liberon amas? Loĝu rure,
 ne kie la magnatoj
 sekuras inter siaj sbiroj nure,
 kaj kie al triumfa modo-ĉaro
 la saĝon kaj racion oni ĉenas,
 dum stulta plebo nur pri mon' komprenas,
 kaj al nobeloj plaĉas la vulgare.
 Ĉu vi la virton amas? La izolo,
 la pacoplena solo,
 en kiu ni sinjuĝe trarevuas
 la proprajn farojn kaj inklinojn, montras,
 ke rura paco pleje nin instruas.
 Ĉu volas vi kontenton
 kaj tiom da feliĉo kiom eblas
 en vivo homa, kie sin implikas
 la rido kun la ploro, kaj eterne,
 apud la rozo plaĉa, dornoj pikas?
 Kampulan sorton ĝuu; ĝi unikas;
 en tiu rura paco, nek l' envio
 nek la rankor' ĉagrenas aŭ amaras;
 la molon litan tie nur preparas
 kontento, kaj labor' kaj vento pura;
 bongustas la nutraĵo senkomplika,
 sen la perturboj de manĝad-eksceso;
 kaj estas hejm' sekura
 la domo praradika,
 en kiu sidas sano kaj komplezo.
 Spiradu la aeron de la montoj,
 kie la vir' sen forto
 retrovas energion; kie tardas
 alpaŝo de la oldo,
 dum sur virinaj vangoj rozoj ardas.
 Ĉu tie efektive ete varmas
 la flamo ama de honesta brilo?
 Ĉu tie belulin' apenaŭ ĉarmas,
 ĉar tiu, kun humilo,
 per trompaj kosmetikoj ne sin garnas?
 Ĉu tie koroj aŭdas senatentaj
 al vortoj purasentaj
 —kies sopir' naive sin esprimas—
 kaj kun intenco fia trompon ŝpinas?
 Ne tie oni provas ĉe spegulo
 afekti per imito rida, gesta,
 nek mankas ŝminko al virin' honesta,
 (ja sano kaj modesto ŝin koloras)
 nek flank-rigardo de timida amo
 la rektan vojon al anim' ignoras.

Ĉu al vi penso venas,
 ke fortas pli ligiloj de Amoro
 se kaŭze de intereso
 —tirano super koro—
 la sento cedas al la mona pezo?
 Ĉu ne pli bone, se geparon benas
 sopir' samaĝa kaj libera jeso?
 Ankaŭ enrure devoj
 farendas; fermu, fermu jam la vundon
 militan; kaj la tero fruktodona
 —nun kruda kaj senhava—
 submetu sin al olda labor-jugo,
 ke ĝi komencu retributi sklava;
 al mucl-rado, al baseno seka
 refluu jam la akvo vivoveka;
 hakiloj la arbaron densan rompu,
 aŭ ĝin la fajro voru, ke ĝangaloj
 en ombro kaj senfrukto ne plu pompu;
 sin ŝirmu en la valoj
 la kan' akv-akompana;
 la pomoj, mandarinaj,
 en montofreŝo sana
 forgesu brizon de l' oraland' hispana;
 orname sur mont-klinoj
 leviĝu kafarbaroj;
 al teobromoj ĉe la river-bordo *
 protektan ombron donu la bukaroj; *
 ĝardeno tie... transe, horto plia...
 Ĉu temas pri deziro fantazia?
 Jam obeemaj al agrokulturo
 popolonutra, sklavo-bandoj iras
 kaj per maĉetoj kurbaj sin preparas.
 Mi aŭdas, ke en la ĝangal-obskuro
 voĉkrias ili; ĉio krake knaras,
 ĉar hakas klingoj en rumor' konfuza.
 La batoj eĥon kreas
 en foro, dum ceibo olda veas *
 reziste al plotono
 konsumiĝanta ŝvite;
 sed sub agreso centhakila tremas
 kaj brue falas ĝia vasta krono.
 Bestioj fuĝis; kaj la birdoj lasas
 la karan neston, la senplumajn idojn,
 kaj al arbaro nekonata pasas,
 kaj homojn evitadas dolorsente.
 Nu, vidu, ke torente
 krakantaj flamoj fluas
 al la aridaj restoj de l' ĝangalo
 kaj ĉie mordas kaj detruas;
 la incendio fore, ade bruas;
 en nigraj kirloj sin la fumo rulas
 kaj nubon super nubon akumulas;
 kaj kio ĵuse estis
 belega verdo, sukoplena freŝo,
 fariĝis mortaj trunkoj
 kaj griza cindro: trista monumento
 al homa fato, moko de la vento.
 Sed la sovaĝaj plantoj
 de la ĝangalo densa, senkultiva
 anstataŭiĝis jam per grandaj kvantoj
 de riĉaj garboj sur la grund' fruktiva.
 Jam frondo frondon baras
 kaj kaŝas tagolumon for de l' ŝoso;
 elvolviĝinte, la unua floro
 vidinde belas, esperdone karas.
 Jam la espero ridetante viŝas
 la ŝviton el la frunto kamparana:
 montriĝas tie fruktoj en abundo
 apud rikoltoj nutraj kaj florantaj,
 kiel tributo de la rura grundo;
 pro pezo de la korboj plenaj, grandaj,
 ĝisrande kun produktoj fruktaj, grenaj,

portataj kampulmane,
 kraketas plank-tabuloj magazenaj.
 Ho, Di! Ne ŝvitu vane
 la homo de la ruro ekvatora:
 per Via help' kaj amo
 sin sentu for el sveno kaj marasmo;
 li nove kun labor-entuziasmo
 post tiom da angoro kaj tumulto,
 da jaroj de kruelo,
 milito krima, morto kaj insulto,
 al Vi sin turnas re kun pli' sincera.
 La kredo lia, simpla sed fervora,
 ricevu de Vi benon; li ne spertu
 la elreviĝon de esper' ankora;
 pli bone, ke li certu,
 ke faktos tio, kion li deziras;
 ne pereigu pluv' ekstersezona
 la ĝermon delikatan; fiinsekto
 ne rongu murde en la mol' burĝona,
 kaj uragan' ĝin traktu kun respekto;
 kaj la soifo de somero dura
 ne suĉu tute suknon de la planto.
 Ĉar Via volo nura,
 la suverena arbitracianto,
 decidis tiri el la fremda jugo
 la kolon de la homo amerika,
 por ke li staru kun libera nuklo,
 liberon benu, kresku ĝi fortika;
 militon jetu al abism' profunda;
 la timon al la glavo murda, vunda
 jam perdu la pac-amaj familioj,
 kiuj la ruron flegas
 por nutro de la homoj kaj nacioj;
 la koron la alarmoj ne plu ŝiru
 la rusto trista el plugiloj iru.
 La kulpon patran pro konker-brutalo
 ni jam sufiĉe pagis ĝis totalo.
 Ĉu ne al kor' ŝokita
 aperas ĉie erikejoj dornaj
 anstataŭ kampoj riĉaj, urb' invita?
 Da mortoj, proskripcioj,
 torturoj, orfoj mornaj,
 kiu kalkulus ĝis la tuta sumo?
 Jam kuŝas, sataj je la sang' ibera,
 Atahualpo apud Montezumo.*
 Ha! De la tron' supera,
 kies skabelon formas fluga ĥoro,
 kiu kontemplas en ekstaz-adoro
 vizaĝon Vian ĉe la lum' etera,
 la pac-angelon sendu
 (se la homaro senfortuna indas
 Vian atenton, eĉ se nur momente)
 por ke l' ibero krude truda, pente
 forgesu pri la olda tiraneco,
 obeu pie Vian leĝon sanktan,

validan ĉiam por la homa speco,
 kaj premu al la frato justo-ama
 la manon (sangan pro li!) senarmilan,
 vekante la naturon pac-humilan
 sidantan en la sin' amerikana.
 La koro pur-elana,
 kiu obskuran vivon ne sopiras,
 kaj en hazardon sangan de batalo
 jubile sin entiras,
 kaj al danĝeroj noblaj sentas amon
 serĉanto povon, famon —
 rigardu nur ofenda kaj malbona
 honoron ne donitan de l' patrio:
 libero dolĉas pli ol imperio,
 olivo belas pli ol laŭr' renoma.
 Jam en civila stato
 demetu l'uniformon la soldato;
 la flagoj de la venko
 ĉe la patri-altaro alte famu;
 kaj la meriton nur, la glor' ornamu.
 Kaj tiam, ho patrujo!, brilos glime
 la sopirata pac-triumfo fine:
 la pac', ĉe kies vido plenas mondo
 de ĝoja faciligo, de kontento,
 kaj homoj venas re al labor-rondo,
 kaj ŝipoj levas ankron (al la vento
 fidante siajn velojn optimisme)
 kaj ruro zumas, vibras la fabrikoj,
 kaj serpoj mankas al la multaj spikoj.
 Ho, landoj sin levantaj, nove vivaj
 kun fruaj laŭroj pompe sur la frunto,
 antaŭ la mir' de regnoj okcidentaj!:
 honoru al la ruro, al naivaj
 kutimoj de kampuloj sincersentaj,
 kaj tiel havos en vi mem senĉese
 azilon la libero,
 l' avido bridon kaj la leĝo templon.
 Stimulos sin, citante ĉi ekzemplon,
 la homoj kun la espero
 senmortan gloron trafi ĉiapreze.
 Via idar' klopodos
 ĵaluze vin imiti; famo notos
 aldone novajn nomojn
 al nune gloraj homoj.
 "Jen ili, jen la filoj
 (la famo distrumpetos)
 de viroj, kiuj estis la venkintoj
 de krutaj Andoj-pintoj,
 kaj en Maipo, Boyacá, sur teroj
 de Junin, kaj en la kampanjo fama
 ĉe Apurima, sciis
 la forton ŝiri de l' leon' hispana."

El la hispana: *Fernando de Diego*

G L O S O J

dum en koralaj urnoj, heroj fruktas — «koralaj urnoj»: frukto, en formo de kalabaso, kie troviĝas la grajnoj de la kakao.

Anahŭako — indiĝena nomo de Meksikio (Anahuatl), la 'litere 'inter du akvoj'.

la arbuston el Sebao — aludo al la kafo.

Liao — alia nomo de Bakko.

al teobromoj ĉe la river-bordo — «teobromo», scienca nomo de la kakao (theobroma cacao L.).

protektan ombbron donas la bukaroj — «bukaro» (hispane, *bucare*), granda arbo, ĉe kies ombro prosperas la plantoj de kakao.

dum ceibo olda veas — «ceibo» (hispane, *ceiba*): giganta arbo tropika.

Atahualpo apud Montezumo — Atahualpo: inkao reganta en Peruo, kiam la hispana konkeranto Pizarro kaj lia grupo invadis la landon. Montezumo: indiĝena suvereno reganta en Meksikio, kiam alvenis tien la konkera ekspedicio hispana de Hernán Cortés.

LA REĜO MAĈJO LA UNUA

Lanusz Korczak

Kaj okazis tiel.

La doktoro diris, se la reĝo ne resaniĝos dum tri tagoj estos tute malbone.

La doktoro diris tiel:

—La reĝo estas grave malsana kaj se li ne resaniĝos dum tri tagoj, do estos tre malbone.

Ĉiuj tre ĉagrenis, kaj la plej ĉefa ministro surmetis okulvitrojn kaj demandis:

—Do, kio okazos, se la reĝo ne resaniĝos?

La doktoro ne volis klare diri, sed ĉiuj komprenis, ke la reĝo mortos.

La plej ĉefa ministro tre ekĉagrenis kaj alvokis la ministrojn por konsilo.

Kunvenis la ministroj en granda salono, eksidis sur oportunaj apogseĝoj ĉe longa tablo. Antaŭ ĉiu ministro kuŝis sur la tablo folio da papero kaj du krajonoj: unu ordinara, kaj la dua de unu flanko — blua, kaj de alia — ruĝa. Kaj antaŭ la plej ĉefa ministro staris ankaŭ sonorilo. La ministroj ŝlofermis la pordon, por ke neniu malhelpu, ili lumigis elektrajn lampojn — kaj nenion diris.

Poste la plej ĉefa ministro eksonoris per la sonorilo kaj diris:

—Nun ni interkonsiliĝos, kion fari. La reĝo ja estas malsana kaj ne povas regi.

—Mi pensas — diris la ministro de milito — ke oni devas voki la doktoron. Li diru klare, ĉu oni povos resanigi la reĝon, aŭ ne.

Ĉiuj ministroj tre timis la ministron de milito, ĉar ĉiam li portis sabron kaj revolveron, do ili obeis lin.

—Bone ni voku la doktoron — diris la ministroj. Tuj oni vokis la doktoron, sed la doktoro ne povis alveni, ĉar ĝuste li metadis sur la reĝon dudek kvar kupojn.

—Nenio farebla, ni devas atendi — diris la plej ĉefa ministro — sed dume diru, kion ni faru, se la reĝo mortos.

—Mi scias — diris la ministro de justeco. — Laŭ la leĝo, post morto de reĝo surtroniĝas kaj regas la plej aĝa reĝido. Tial oni nomas lin kronprinco. Se la reĝo mortos, do surtroniĝos lia plej aĝa filo.

—Sed la reĝo havas nur unu solan filon.

—Pli multe ne estas bezone.

—Ho jes, sed la reĝa filo estas ja malgranda Maĉjo. Kiel li povas esti reĝo? Maĉjo ankoraŭ eĉ ne scipovas skribi.

—Estu tiel — respondis la ministro de justeco. — En nia ŝtato ankoraŭ ne estis tia kazo, sed en Hispanujo, Belgujo kaj ankoraŭ en aliaj landoj okazis, ke reĝo mortis kaj postlasis malgrandan fileton. Kaj tiu malgranda infano devis esti reĝo.

—Jes, — diris la ministro de poŝto kaj telegrafo — mi eĉ vidis tiajn poŝtmarkojn kun portreto de tia malgranda reĝo.

—Sed, estimataj sinjoroj, — diris la ministro de klerigo — estas ja neeble, ke la reĝo ne scipovu skribi aŭ kalkuli, ke li ne konus geografion nek gramatikon.

—Ankaŭ mi tiel pensas — diris la ministro de financoj. — Kiel la reĝo faros kalkulojn, kiel li ordonos kiam oni devos presi novan monon, se li ne konas la tabelon de multobligado?

—Plej malbone, miaj sinjoroj — diris la ministro de milito — ke neniu timos tian malgrandan reĝon. Kiel li sukcesos kun soldatoj kaj generaloj?

—Mi pensas, — diris la ministro de internaj aferoj — ke tian malgrandan reĝon ne nur soldatoj ne timos, sed neniu. Ĉiam ni havos strikojn kaj ribelojn. Por nenio mi povas garantii, se vi faros Maĉjon la reĝo.

—Mi nenion scias, kio estos — diris la ruĝa pro kolero ministro de justeco. — Mi nur scias: la leĝo ordonas, ke post morto de reĝo surtroniĝu lia filo.

—Sed Maĉjo estas tro malgranda! — ekkriis ĉiuj ministroj. Kaj certe okazus granda kverelo, sed en tiu ĉi momento malfermiĝis la pordo — kaj en la salonon eniris eksterlanda ambasadoro.

Ŝajnas strange, ke la eksterlanda ambasadoro eniris en la kunsidejon de la ministroj kiam la pordo estis ŝlofermita. Do mi devas diri, ke kiam oni iris voki la doktoron oni forgesis ŝlofermi la pordon. Poste iuj eĉ diris, ke tio estis perfido, ke la ministro de justeco lasis la pordon malfermita, ĉar li sciis, ke devas veni la ambasadoro.

—Bonan vesperon! — diris la ambasadoro. — Mi venas ĉi tien en la nomo de mia reĝo kaj postulas, ke la reĝo fariĝu Maĉjo la Unua kaj se vi ne deziras eksplodos milito.

La ministro-prezidanto (la plej ĉefa ministro) tre ektimis, sed ŝajnis, ke tio tute ne interesas lin, — skribis sur la folio de papero per la blua krajono: Bone estu la milito — kaj donis tiun ĉi paperon al la ambasadoro.

Tiu prenis la paperon. Sin klinis kaj diris:

—Bone, mi skribos pri tio al mia registaro.

En la sama momento eniris en la salonon la doktoro kaj ĉiuj ministroj petis lin, ke li savu la reĝon, ĉar povas okazi milito kaj malfeliĉo, se la reĝo mortos.

—Mi jam donis al la reĝo ĉiujn kuracilojn, kiujn mi konis. Mi metis la kupojn kaj nenion plu povas fari. Sed oni povas voki ankaŭ aliajn doktorojn.

La ministroj atentis la konsilon kaj alvokis ĉiujn famajn doktorojn por interkonsiligo, kiel savi la reĝon. Ili sendis en la urbon ĉiujn reĝajn aŭtomobilojn, kaj dume petis la reĝan kuiriston pri vespermangŝo, ĉar ili estis tre malsataj kaj ne sciis, ke la interkonsiligo daŭros tiom longe — kaj ili eĉ ne tagmangŝis hejme.

La kuiristo metis arĝentajn telerojn, verŝis en botelojn plej bonan vinon, ĉar li volis resti en la kortego ankaŭ post morto de la maljuna reĝo.

Do la ministroj mangŝas kaj drinkas kaj ili eĉ gajigis; kaj dume en la salono kunvenis la doktoroj.

—Mi pensas — diris la maljuna doktoro kun barbo — ke la reĝon oni devas operacii.

—Kaj mi pensas — diris la alia doktoro — ke al la reĝo oni devas fari varman kompreson kaj ke li gargaru la gorĝon.

—Kaj li devas preni pilolojn — diris la eminenta profesoro.

—Kaj certe gutoj estos pli bonaj — diris iu alia.

Ĉiu el la doktoroj kunportis dikan libron kaj montradis, ke en lia libro estas skribite alie, kiel kuraci tian malsanon.

Jam estis malfrue kaj la ministroj tre volis dormi, sed ili devis atendi, kion diros la doktoroj. Kaj tia bruo estis en la tuta reĝa palaco, ke la malgranda kronprinco, Maĉjo, la reĝido, jam dufoje vekigis.

“Oni devas rigardi, kio okazas tie” — ekpensis Maĉjo. Li forlasis la liton, vestis sin kaj eliris en la koridoron.

Li ekstaris antaŭ pordo de la mangŝsalono, ne por subaŭskulti, sed en la reĝa palaco la ansoj estis tiel alte situataj, ke la malgranda Maĉjo mem ne povas malfermi la pordon.

—Bonan vinon havas la reĝo! — kriis la ministro de financoj. — Ni trinku ankoraŭ, miaj sinjoroj. Se Maĉjo fariĝos reĝo, do li ne bezonos la vinon, ĉar al infanoj estas malpermesite trinki vinon.

—Ankaŭ cigarojn ne rajtas fumi infanoj. Do oni povas kunpreni hejmen iom da cigaroj! — laŭte diris la ministro de komerco.

—Kaj se eksplodos la milito, miaj karaj, mi garantias, ke nenio restos el tiu ĉi palaco, ĉar Maĉjo ja ne defendos nin.

Ĉiuj ridis kaj kriis:

—Ni trinku sanon de nia defendanto, la granda reĝo Maĉjo la Unua!

Maĉjo ne bone komprenis, kion ili diris, sed li sciis, ke la paĉjo estas malsana kaj ke la ministroj ofte kunvenis por interkonsiligoj. Sed kial ili priridas lin, Maĉjon kaj kial ili nomas lin reĝo, kia milito devas okazi tion li tute ne komprenis.

Iom dormema kaj iom timigita li iris pluen tra la koridoro kaj ree antaŭ la konsilsalono ekaŭdis la alian interparolon:

—Kaj mi diras al vi ke la reĝo mortos. Vi povas doni pilolojn kaj kuracilojn — nenio helpos.

—Mi donas la kapon, ke la reĝo ne vivos eĉ la semajnon.

Maĉjo ne aŭskultis plu. Rapide li trakuris tra la koridoro, ankoraŭ du grandajn reĝajn ĉambrojn kaj senspire enfalis en la reĝan dormejon.

La reĝo kuŝis sur lito tre pala kaj malfacile spiris. Kaj apud la reĝo sidis sola, la sama bonkora doktoro, kiu ankaŭ kuracis Maĉjon kiam li ne estis sana.

—Paĉjo, paĉjo — ekkriis Maĉjo kun larmoj — mi ne deziras, ke vi mortu!

La reĝo malfermis la okulojn kaj malgaja ekrigardis la fileton.

—Ankaŭ mi ne deziras morti — diris la reĝo mallaŭte — mi ne deziras, fileto, lasi vin sola en la mondo.

La doktoro prenis Maĉjon sur la genuojn. — Kaj plu ili nenion diris.

Kaj Maĉjo rememoris, ke li jam tiel sidis apud lito. Tiam la patro tenis lin sur la genuoj, kaj sur la lito kuŝis la panjo, same pala, tiel same malfacile spiris.

“La paĉjo mortos, kiel mortis la panjo” — ekpensis Maĉjo.

Kaj terura malĝojo falis sur lian bruston — kaj granda kolero, kaj ofendosento kontraŭ la ministroj, kiuj tie priridas lin, Maĉjon, kaj morton de lia paĉjo.

“Mi do repagos al ili, kiam mi estos reĝo” — ekpensis Maĉjo.

Tradukis el pola lingvo

Isaj Dratwer

PUBLIKAJ DEMANDOJ AL LA NUNA GVIDANTARO DE UEA

La Rezolucio de la Komitato de UEA pri neŭtraleco, aprobita poste ankaŭ de la 60-a UK (laŭ KRG n-ro 9/75. p. 117) asertas, ke al "akuzoj", kiuj "kontestas la politikan neŭtralecon de UEA... mankas ĉia bazo de vero kaj ke ne ekzistas unu-sola pruvo, kiu pravigus tiajn misprezentojn" plue, "ke la politika neŭtraleco de UEA, kiel ĝi estas priskribita en la artikoloj 4 kaj 13 de ĝia Statuto ĉiam estis, kaj restos la fundamenta gvidprincipo de ĝia tutmonda agado..." (p. 142 de *Esperanto*).

Art. 4 de la Statuto preskribas, ke UEA estas neŭtrala rilate al nacieco, raso, religio, politiko kaj sociaj problemoj, sed ke la respekto de la homaj rajtoj estas esenca kondiĉo por ĝia laboro. Art. 13 preskribas, ke landa asocio povas aliĝi al UEA, se... vidiĝas klare el ĝia Statuto, ke temas pri Asocio neŭtrala laŭ la senco de par. (art. 4).

En julio 1975, do antaŭ la UK, aperis mia lasta verko *Hamburgo en Retrospektivo: Dokumentoj kaj materialoj pri la kontraŭneŭtraleca konspiro en UEA*. Mi demandas la voĉdonintojn ĉu, antaŭ la voĉdono, ili tralegis tiun libron, kaj ĉu, leginte ĝin, kiu ajn el ili povas kontesti unusolan el amaso da faktoj, kiuj pruvas la forlason de la principo de politika neŭtraleco. Se ili ne tralegis, estus konsilinde fari tion nun por povi kompari la faktojn kun la asertoj en la Rezolucio.

Post la publikigo de *HeR* venis en mian posedon la aliĝpeto de la 1-a de julio 1975 de la Centra Laborrondo Esperanto de GDR. La gvidprincipoj, aldonitaj al la aliĝpeto, eksplicite deklaras, ke "la esperantistoj de GDR utiligas la Internacian Lingvon por la batalo kontraŭ la imperiismo; ili decide kontraŭas ĉiujn variantojn de antikomunismo, reviziismo, konverĝa teorio kaj neŭtralismo". Laŭ la ricevitaj informoj, la Komitato de UEA prokrastis la decidon pri la aliĝpeto, sed

la oficiala organo de UEA silentis pri tio.

Mi demandas la komitatanojn kaj kongresanojn, kiuj voĉdonis por la Rezolucio: (I) ĉu ili legis la aliĝpeton kaj la menciitajn gvidprincipojn antaŭ ol voĉdoni; (II) se jes, ĉu ili fakte opinias, ke la gvidprincipoj estas konformaj al art. 13 kaj 4 de la Statuto de UEA kaj, en kazo de pozitiva respondo, kiel la Laborrondo ne estis tuj akceptita kiel aliĝinta landa asocio; (III) se la gvidprincipoj estas kontraŭaj al art. 13 kaj 4 de la Statuto, kiel ili evidente estas, kial la Komitato ne kuraĝis tuj malakcepti la aliĝproponon anstataŭ prokrasti la decidon, verŝajne por posta skriba voĉdono?

Post la publikigo de *HeR* mi ricevis ankaŭ la Statuton de Bulgara Esperantista Asocio kiel laste reviziitan en 1972 dum la kongreso en Smoljan, la sama kiu akceptis la nunan Programon de BEA (v. *HeR*, p-oj 25-35). Laŭ art. 1/c, unu el la eksplicitaj celoj de BEA estas "eduki siajn membrojn en la spirito de patriotismo kaj proleta internaciismo, de alligiteco al la tendaro de l' socialismo..." Pri la difino de "proleta internaciismo" v. 3. 2 en *HeR*.

Mi demandas: (I) ĉu la voĉdonintoj sciis kion ajn pri tiu evidente politika celo de BEA, cetere tute konforma al ĝia aperte politika agado almenaŭ ekde 1971; (II) ĉu ili opinias, ke tia celo estas konforma al art. 13 kaj 4 de la Statuto de UEA; (III) se ne, kial la Komitato ne iniciatis eksigon de BEA el UEA konforme al art. 20 de la Statuto?

La membraro de UEA kaj la tuta esperantistaro, kiu interesiĝas pri ĝia sorto kaj entute pri la sorto de la neŭtrala Esperanto-Movado, rajtas ricevi klaran respondon al tiuj demandoj por povi mem konstati, ĉu la asertoj de la Rezolucio estas ĝustaj aŭ misgvidaj.

Ivo Lapenna

FAKTOJ PRI LA MEMBRARO, FINANCOJ KAJ LABORO

Ekde septembro 1974 preskaŭ en ĉiu n-ro de *Esperanto* aperis amaso da eksplicitaj aŭ implicitaj misprezentoj pri faktoj kun la evidenta celo malgravigi aŭ eĉ neniigi la atingojn de UEA en la antaŭhamburga periodo kaj kaŝi la rapidan detruadon de tiuj atingoj sub la nuna gvidantaro. Ĉi tie mi limigos min nur al tri el ili.

1. En *Esperanto* de junio 1975, p. 101, estas dirite: "Se oni rigardas la statistikajn pri la nombro de la individuaj membroj dum la lastaj 20 jaroj, oni venas nur al unu klara konkludo — tiu nombro apenaŭ ŝanĝiĝas, ĝi stagnas". En la septembra numero, 1975, d-ro V. Sadler asertas: "Dum la pasintaj 30 jaroj la nombro de individuaj membroj de UEA restis pli-malpli konstanta: meze ĉ. 6700, kun fluktuoj de ne pli ol 15%". Ambaŭ harmoniigitaj asertoj de la direktoro kaj vicdirektoro de la CO estas krude misgvidaj. "Mezaj" ciferoj en tiu ĉi kunteksto diras absolute nenion: laŭ la sama logiko oni povus arbitre diri, ke inter 2 membroj kaj 10.000 la Asocio havis "meze" 5.001 membrojn dum sia tuta ekzistado! La vero estas, ke ĝis 1954 la nombro de individuaj membroj en la postmilita periodo estis ĉ. 6.000, plejparte sub tiu nombro; ke nur ekde 1954, dank' al multflankaj sukcesaj agadoj de UEA, la nombro komencis kreski kaj estis 7.642

en 1959; ke ekde tiu jaro ĝi konstante, kun unusola escepto, estis ĉiam pli ol 7.000; ke en 1973 (la lasta jaro antaŭ Hamburgo), malgraŭ la ĉiaspekaj sabotadoj, ĝi estis 7.302; ke en 1974 ĝi terure falis al 6.543, do katastrofa "neta" perdo de 759 individuaj membroj en unusola jaro. Tiurilate la Asocio retroiris je "nuraj" 18 jaroj: tio estas la plej malalta nombro de individuaj membroj ekde 1956, kiam, dum sia suprenirado, la Asocio estis atinginta 6.474 membrojn, siavice ĝis tiu jaro la plej granda nombro ekde la kunfandiĝo en 1948 kaj eĉ ekde la fruaj tridekaj jaroj! La demando pri la membronombro estas tro serioza por facilanime kaj misgvide ludadi per "mezaj" ciferoj, sen kia ajn konsidero al la veraj kaŭzoj de la kreskoj kaj de la nuna katastrofa malkresko.

2. La informoj pri la financa situacio de UEA kaj en la Estrara Raporto por 1974-75 kaj en *Esperanto* estas rekte malveraj kaj tial plej serioze misgvidaj. La evidenta celo estas kredigi la membraron, ke la antaŭa Estraro sub mia prezidanteco "postlasis UEA'n en pli ol mizera financa stato", kiel klaĉis la nuna ĝenerala sekretario en "privata letero" sur la oficiala papero de UEA de la 10-a de aprilo 1975. La vero estas, ke ekde 1948 ĝis 1973 la Asocia kapitalo — la sole decida bazo por juĝi pri la financa stato de UEA — daŭre altiĝadis malgraŭ la oftaj jaraj deficitoj, kiel klare montrite per konkretaj ciferoj en 18.6 kaj 18.7 de *Esperanto en Perspektivo*. Eĉ en 1973, malgraŭ la grandega kaj neniel pravigebla defcito de 59.500 gld. (pro kiu ĉefe respondecas la estrarano pri financoj kaj la direktoro, prisilentinta al mi la minacon dum la tuta 1973 kaj ĝis aprilo 1974, kiam nenio plu estis farebla), la asocia kapitalo malkreskis je nuraj 10.000 gld. al 265.000 gld. Tio signifas, ke fine de 1973 la kapitalo estis 62.000 guldenojn pli alta ol en 1964 kaj 216.000 gld. pli alta ol en 1948 — eĉ senkonsidere al aliaj valoroj neenkalkulitaj en la kapitalo en 1973. Do, precize la malo: la financa situacio de UEA estis ne "mizera", sed pli ol kontentiga en la momento de la hamburgaj eventoj. En 1974 la defcito — malgraŭ la ĉesigo de praktike ĉiuj antaŭaj aktivadoj — estis 39.000 gld. kaj la kapitalo denove malaltiĝis je pliaj 8.000 gld. Se oni tiel daŭrigos, baldaŭ estos formangita la tuta kapitalo same tiel, kiel siatempe en nuraj kelkaj jaroj la ĝeneva UEA formangis preskaŭ la tutan konsiderindan kapitalon Hodler kaj en 1932 minacis ĝin bankroto. Kaj neniam prisilentoj aŭ elturniĝoj povos kaŝi la bedaŭrindan realaĵon.

3. Sur p. 142 de la septembra *Esperanto*, 1975, estas asertite, ke la t.n. "volontula servo" plenumas "preskaŭ senkoste multon, kio pli frue devis esti salajrata". Ĉu la aŭtoro ne povus iom informi pri kiuj laboroj konkrete temas? Laŭ mia scio, ĝis Hamburgo amaso da taskoj, kiuj nun tute ne estas plenumataj, estis realigataj senkoste ekster la CO: redaktado de ĉiuj bultenoj (IGS, Unesko-Novajoj, Impulsoj, k.a.); redaktado de centoj da cirkuleroj en pluraj serioj konforme al la iamaj ĉefagadoj de UEA; redaktado de dokumentoj, studoj kaj libroj de CED, kaj la tuta ampleksa laboro de tiu institucio kun la escepto de la pure teknikaj laboroj en la CO; organizado de ĉiuj grandaj kampanjoj de UEA, inkluzive verkadon de programoj, planoj, memorandoj kaj specialaj dokumentoj; dum pluraj jaroj eĉ redaktado de *Esperanto* kaj de aliaj periodaĵoj de UEA, ktp. Pro tiuj multflankaj agadoj ankaŭ la CO siatempe sukcese plenumadis, ofte kun maloli da oficistoj ol nun, diversajn taskojn kiujn ĝi nun tute ne plenumas. Efektive, eĉ *Esperanto* aperadas kun grandegaj malfruigoj de 5-6 semajnoj, laŭ mia scio absolute senprecedence en la tuta historio de UEA.

Kion, do, oni nun plenumas "preskaŭ senkoste, kio pli frue devis esti salajrata"? La membraro rajtas ricevi informon.

Ivo Lapenna

FANTAZIAĴOJ.....

La Nobel-pacpremiita A. Skharov, fondinto de la movado pri homaj rajtoj en Sovetunio, deklaris antaŭnelonge al pluraj gazetoj: "La diskonigo de la faktoj estas nia sola defendo kontraŭ arbitra povo". Tiuj asertoj ja bone ankaŭ prilumas la nunan situacion en la "laŭnormigita UEA" kaj pravigas la interesigon de la gazetaro kaj publikigon de multaj artikoloj cele al diskonigo de la puĉo realigita en Hamburgo.

Por ĵurnalisto de grava agentejo specialiginta pri la orienteŭropaj landoj nur konfirmiĝis la informoj jam konataj al li el diplomataj fontoj kaj el anglalingva revuo, laŭ kiuj la salajrataj funkciuloj de la Partio, kontrolantaj la Esperanto-organizaĵojn de la t.n. "socialisma bloko", sukcesis regi en la decidopova aparataro de UEA, same kiel ili jam sukcesis en pluraj

aliaj internaciaj organizaĵoj...

La samon povis konstati ankaŭ tiu alia rubrikestro de pariza gazeto longe antaŭ la apero de la lasta verko de Prof. Lapenna. Kun kompato mi legis la embarasitajn cerbumaĵojn de D-ro Artur Bormann en "Interlingvistika Informa Servo" kaj pli precize la aludojn pri "Le Monde" kaj "L' Aurore". Mi ne liveros al D-ro Bormann la komentojn de la ĵurnalistino rilate la informintinon en Kopenhago. Mi simple diros, ke 2/3 de la artikolo estis fortranĉitaj, kaj restis "omnibus artikolo" kiu povus aplikiĝi al iu ajn alia kongreso.

D-ro Bormann (Artur aŭ Wernen) verŝajne neniam legis la artikolojn aperintajn sub mia respondeco en Madrido, Vieno, ktp.

Same por "L' Aurore": D-ro Bormann ne vidas diferencon inter "révolte" kaj

"révolution".

Li konsultu la vortaron antaŭ ol skribi.

Sed, tion postuli de D-ro Bormann estas sendube tro!

Plian pruvon pri tiu regado de la novaj "etaj mastroj" oni ankaŭ trovas en la rezolucioj de la "pup teatra komitato" en Kopenhago (31 ĉeestintoj kies plimulto devenas de la orienta bloko kune kun la kutimaj amikoj el okcidento, la famaj komitatanoj C alektitaj pro apogo al la protagonistoj de la politika puĉo) kiu ja ne povas, same kiel en Hamburgo ĝi ne povis, kondamni sin mem! Troviĝis eĉ iu el la franca asocio, kiu sendis al la franca gazetaro tiujn rezoluciojn, tiel kompromitante la francan movadon, kion substrekis la ĵurnalistoj! (Neniu gazeto publikigis tiujn stultajojn!).

Tion dirante, mi ne povas silenti pri la stranga sinteno (milde dirite!) de la siatempaj komitatanoj A de la franca asocio, kiuj en Londono ne partoprenis en la voĉdono pri la estraro de UEA, kvazaŭ tiu grava afero ne koncernus ilin, kaj preferis viziti filatelan ekspozicion!

En Beograd, la samaj komitatanoj A voĉdonis kontraŭ la Statuto de UEA, tiel ebligante la komitataniĝon de la nova prezidanto de P.E.A., S-ro Ŝwistak, la likvidinto de la pola fervojista Eo-asocio. Tiuj personoj nun tronas en la estraro de la franca asocio...

Ĉar la satelitoj aŭ silentis, aŭ parolis pri "fantazioj" rilate la libron "Hamburgo en Retrospektivo" kaj la nerefuteblajn faktojn aperintajn en la internacia gazetaro, mi defias la "etajn mastrojn" de la nuna "laŭnormigita UEA" pruvi, "ke mankas ĉia bazo de vero" al la jenaj pliaj faktoj:

"Afero Ŝwistak:

Laŭ cirkulero de 15.01.75 entenanta la jarraporton 1974 de Pola Fervojista-Eo Fakgrupo oni povas legi:

"La situacio de la fervojista Esperanto-movado en Pollando jenas: "la landa organizaĵo PEA, *subordigita kaj financita* (mi substrekas) de la Ministerio de Kulturo kaj Arto, *likvidas* (mi substrekas) laŭ sia decido de 1/4/73 la tutpollandan "Fervojistan asocion" de PEA sen *motivdono* (mi substrekas)... Tio okazis post la lasta elekto de la estraro de PEA kun la nova prezidanto s-ano Ŝwistak. Intertempaj varsoviaj renkontiĝoj de la prezidanto de PEA kaj FS ne donis rezultojn kaj *la likvido restis historia fakto* (sub. de mi). La Ĉefa Estraro de PEA ne ebligis al niaj membroj la forveturon al la lasta IFEF-kongreso en Hispanujo, kio sekve kaŭzis por la aliĝintoj la perdon de senpagaj biletoj al Hispanujo kaj de la akiritaj devizoj por la eksterlanda vojaĝo. Leteroj en supre menciitaj aferoj senditaj al la Ĉefa Estraro de PEA restis sen respondo... La estraro de la tutpollanda fervojista Eo-organizaĵo

ĉesis ekzisti post 17 jaroj de sukcesa plena agado... *Post la likvido de nia Fervojista sekcio fare de PEA la nombro de la membroj falas konstante* (mia substreko): de 112 antaŭ la likvido de la sekcio al 48 post la likvido. La nombro de la IFEF-membroj restis la sama: 25..."

En "Hamburgo en Retrospektivo", Prof. D-ro Lapenna memorigas, "ke je tiu dato (3/4/73) PEA forigis 3 siajn komitatanojn inter kiuj la malnovan fidelan pioniron Toczyski, kvankam ne estis elektoĵaro... Tio kontraŭas al art. (A) de la Statuto, kiu preskribas, ke "nur eksigintaj aŭ mortintaj komitatanoj povas esti anstataŭataj". (Same okazis ĉijare en Kopenhago rilate la francajn komitatanojn A, kiujn la sinnomanta komitatano A ĉeestanta insultis dum la kunsido!). Inter la tri novaj polaj komitatanoj (duraj) troviĝis S-ro Ŝwistak. Art. 30 de la ĝenerala regularo, konforme al art. 25 (Ĉ) de la Statuto, preskribas, ke povas esti elektita kiel komitatano A, B, aŭ C nur persono, kiu estis membro-abonanto de UEA almenaŭ dum 3 jaroj antaŭ la jaro de la elektoj. Tamen, en Beograd, laŭ propono de Aleksiev, tiu profesia apostolo de "MEM PACO", li estis allasita kiel komitatano A (Protokolo, paĝo 2 — la du francaj komitatanoj A voĉdonis POR!).

Pri la kompetenteco de S-ro Ŝwistak, nuna estrarano de UEA, respondeculo pri informado, oni povas legi en la "raporto de la ĝenerala sekretario de UEA" (kiu ŝajne sentis la bezonon "distanĉiĝi", sed kiu, laŭ art. 30 de la Statuto, respondas pri informado!).

Capitro VIII-Informado:

"Raporto de la kompetenta estrarano ne atingis nin."

(Tiu frazo, en sia elokventa sekeco, klare montras la nunan etoson inter la kolegoj de la estraro!)

Afero TEJO:

La gazetaro menciis la politikigon de TEJO ekde la deklaro de Tyresö, kiu de simpla deklaro fariĝis preteksto al "incendiaj deklaroj" de TEJO-agitantoj. Mi invitas la skeptikulojn relegi "Kontrakto"-n kaj la cititajn frazojn same kiel la reagojn de la tiama estraro de UEA en "Hamburgo en Retrospektivo". Krome, D-ro Tonkin prezidanto de UEA estinta prezidanto de TEJO, eble povos prilumi al ni la celon de la t.n. "ideologia komisiono", kiun li starigis siatempe en TEJO?

Aliĝpeto de CLEK, Orienta Berlino

La 8-an de julio atingis min aerpoŝta letero datita la 1-an de julio 1975 en Orienta Berlino, laŭ kiu "la Centra Laborrondo Esperanto de GDR en Germana Kulturligo" proponas, ke la komitato de UEA decidu dum siaj kunsidoj en Kopenhago pri ĝia aliĝpeto "kiel kolektiva

membro de UEA" ekde 1.1.76. Al la propono estis aldonitaj 3 sinsekvaj numeroj de "Der Esperantist" (indaj je legado!) kaj aliaj dokumentoj, interalie "la gvid-principoj por la laboro de la esperantistoj en la K.L. de GDR". Jen kelkaj pecoj el tiuj literaturajoj:

"La esperantistoj de GDR utiligas la Internacian Lingvon por la *ideologia batalo kontraŭ imperiismo*. Ili decide kontraŭas ĉiujn variantojn de antikomunismo, reviziismo, *konverĝa teorio* kaj *neŭtralismo*. Ili aktivas por akceptigo de paca kunekzistado inter diversociaj ŝtatoj, subtenas la *antiimperisman liberigan batalon* kaj pledas por pli larĝa uzo de Esperanto serve al la paco kaj progreso. Ili *kunlaboras kun ĉiuj progresivaj lingvoamikoj kaj organizaĵoj, kiuj sekvas la samajn aŭ similajn celojn.*" (Substrekoj miaj.)

Nu diru al mi:

Ĉu "Radio Varsovio" (kiu aŭdigis la voĉon de la "pacbatalanto" Aleksiev kantantan la "Espero"-n, kaj tiel insultis la memoron de Rytkov, Drezen kaj multaj aliaj cititaj en "Arkipelo Gulag") parolis pri tiu aliĝpeto?

Ĉu "Heroldo de Esperanto", "Pilo-Press" kaj iu ajn alia Esperanto-gazeto aludis pri ĝi? Estrarano de UEA eĉ ne havas personan opinion pri tiu atenco al la neŭtraleco

de UEA kaj lasas al la komitato la zorgon decidi. Afero prokrastita: ĝis kiam?

Ĝis "skriba voĉdonado" sendube!...

La internaciaj rimedoj de amasa komunikado vaste diskonigis la VERON kaj ĉiam pretos diskonigi ĝin. Uzi Esperanton, jes, sed ne misuzi la neŭtralan Esperanto-Movadon favore al iu partia politiko, kia ajn ĝi estas, interne de UEA. HUMANECA INTERNACIISMO postulas konstantan kaj viglan atenton.

Ni neniam forgesos tion.

Kaj nun, kiel konkludon, mi levas la jenajn demandojn:

—Sekve al subskribo fare de ĉiuj landoj de la interkonsento de Helsinko, kiom da esperantistoj el la orientaj landoj, krom la pagitaj funkciuloj, povis ĉeesti la U.K. en Kopenhago?

—Kial, en la rezolucioj de la UK, ne estis menciita (eĉ per unu sola vorto) la "libera cirkulado de ideoj kaj de homoj", nepra kondiĉo por UZADO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO despinita por ĈIUJ HOMOJ?

André BOURDEAUX

Profesia gazeta ataseo, estinta vic-prezidanto de UFE pri informado, fondinto de I.F. de UFE, fondinto kaj estinta redaktoro de «Esperanto actualités» kaj «Esperanto - informations», estinta respondeculo de la I.F. de UEA en Parizo.

REVUO DE LA REVUOJ

Antaŭ pluraj jaroj ĉi tiu rubriko debutis en BOLETIN, organo de la Hispana Esperanto-Federacio. Nun ĝi transiris al la paĝoj de HORIZONTO, kie ĝi plu ludos sian rolon defendi la sendependan neŭtralecon de Esperanto, la Fundamentan strukturon de la lingvo kaj ties sanan evoluon.

Ni ege ŝatus, ke ĉi tiu rubriko (kiu trovas sian nutron en la okazaj eraroj, misoj kaj fuŝoj lingvaj aŭ konceptaj de aliaj kolegoj, kaj en la sistema klopodo politikigi la humanisman esencon de Esperanto) baldaŭ ne necesus pro la malapero de la improvizo kaj de la amatoreco en la lingva kampo, kaj de la parti-tendenca sekteco en la sfero de la «neŭtrala» Movado.

STARTO, organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, aperigas en sia numero 4/50 de 1975 la artikoleon Alvoko al unueco de UEA, kies lasta parto diras:

Per pseŭdoneŭtralismaj asertoj la opoziciuloj kaŝas nun sian indignon kontraŭ la nuntempa estraro de UEA. Pri iliaj atakoj, ekz. kontraŭ Ĉeĥan Esperanto-Asocion oni povis legi en 'Israela Esperantisto' kaj en la hispana 'Boletín'.

Mi ne povas kompreni, ke la subskribinto de la artikolo: "(k)", ne kaptis la belan okazon reprodukti en STARTO la tiel nomatajn atakojn de 'Boletín', por ke la ĈEA-anoj vidu propraokule, kiel malicega estas la redaktoro de la "agresoj". Sendube la kredindeco de k-do "(k)" estas tiel absoluta inter la membroj de ĈEA, ke li ne bezonas iel pruvi sian aserton. Kial la ĈEA-anoj ne postulas, ke k-do "(k)" publikigu kompletan nian komenton pri ĈEA aperintan siatempe en 'Boletín'? Kompreneble, ili scias, kaj ni scias, ke ili perdus la tempon, ĉar STARTO respondus per silento ilian eventualan peton kaj plu tenus fermita la kovrilon de la Tria Korbo, ke ne elsaltu el ĝi faktoj, kiujn la senrangaj membroj de ĈEA ŝajne ne rajtas koni. Same kiel ili ne rajtas koni la libron HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO...

En ESPERANTO de oktobro 1975, n.^o 838 (10), la sinjoro redaktoro Simo Milojevic montras sin tiel genia kiel kutime en sia prezenta rubriketo 'Vi trovos', kie interalie li diras:

Car kelkaj antaŭaj numeroj, kiuj preskaŭ plaĉis al la redaktoro, ne plaĉis al legantoj, restas por esperi, ke ĉi tiu numero, kiu ne plaĉis al la redaktoro, renkontos aprobon de legantaro. Tamen havu bonvolon noti, ke ne estas aparte amuze produktadi revu-numerojn, kiuj eĉ propran guston de la produktanto ne kontentigas.

Ni esprimas nian sinceran simpatian al s-ro Milojevic, ke li ne povas amuzi sin kiom li dezirus, precipe per tiel saĝaj artikoloj kiel 'Danĝera ludo en Sarlando' (ESPERANTO, julio-aŭgusto 1975), kaj ni komprenas lian tragedion kaj frustracion. Sed tial, ke ni estas fervoraj admirantoj de lia dialektiko kaj ne povas rezignacii pri la perdo de liaj belaj argumentadoj, ni permesas al ni sugestii, ke li donu plenan liberon al sia ŝajne briedata batalema spirito, verkante, se necese sub pseŭdonimo, ankaŭ por la paĝoj de BRITA ESPERANTISTO, kies pamfleteca naturo atingis novajn pintojn — aŭ, pli ĝuste, novajn fundojn — de kiam, kurioza koincido!, la estraro de UEA grandanime decidis per oficiala rezolucio ne partopreni en polemikoj. Tiamaniere, s-ro Milojevic sentus sin feliĉa, kiel fiŝo en akvo, kaj al ni ne mankus nemalhavebla fonto de amuzo kaj inspiro.

Al s-ro Milojevic ni sugestas ankaŭ, ke, por distriĝi disde sia ĉagreno kaj bridateco, li komencu verki siajn memorarojn pri la postkulisaj, intime vera vivo disvolviganta en la estrarejo de UEA. Certe li enmondigus siatempe sensacian, furoran libron, kies kopiaron eble HORIZONTO aĉetus de li. Ek al la laboro, s-ro Milojevic!

—ooOoo—

Nia genia Kalocsay daŭrigas en BUDAPESTA INFORMILO, novembro 1975, la publikigon de sia *Pri la vortosistemo de Esperanto*, kies diversajn partojn aŭ ĉapitrojn ni dezirus vidi eldonitaj en formo de libro. Malgraŭ sia alta aĝo, d-ro Kalocsay montras sin tiel talente freŝa kiel en sia plej brila epoko.

Granda parto de la Esperanta popolo ne plene scias ankoraŭ, kiom multe ŝuldas nia lingvo al lia kolosa laboro. Li meritas, ke oni organizu mondskalan omaĝon al lia persono kaj al lia nesuperebla verkaro. Kial ne starigi "komitaton por la aranĝo de internacia omaĝo al d-ro Kalocsay"? HORIZONTO ricevos kun plaĉo eventualajn iniciativojn.

Ĝis la proksima revu-rikolto, kun plej koraj salutoj,

Fernando de Diego

EK-STURMAS... D-RO BORMANN

Jam de longe (18 jarojn) la Interlingvistika Informa Servo, bulteno redaktata de d-ro Artur Bormann, la patro de d-ro Werner, ambicias admoni kaj gvidi la tutan mondon pri ĉiuspecaj problemoj.

Kaj jen en sia lastaperinta numero (oktobro, novembro, decembro 1975) la redaktoro ekrajdas unu plian fojon sian batal-ĉevaleton: la politikon! La vorto ja kvazaŭ pro fiksa ideo fariĝis magia preskaŭ sorĉa formulo: "Tio signifas, li efektive skribas tuj dekomence, ke la problemoj nur povas principe esti traktata surbaze de politikaj vidpunktoj. Ĝi havas unue la lingvopolitikan aspekton kaj krome kulturpolitikan kaj ekonomian, klerigopolitikan kaj sciencpolitikan, socipolitikan kaj tiel por la kunvivado de la homoj entute esencan aspekton." (SIC!) Ĉi tiu listo forgesis citi ankaŭ la babil-politikan aspekton! Sed fakte... Ta ta ta! ĉe tia lavango da kotopo-politikaj vidpunktoj ĉu necesis menciigi ĝin?

—ooOoo—

Kaj jen post ia ŝvebo super la "gigantaj" problemoj de "UNO... Eŭropa Unio... Eŭropa pasporto... maŝintradukado..." prezentigas la "Esperanto-politika strategio" per "pripenso en 12 tezoj" (verŝajne de d-ro Werner).

Ĉu vi sciis tion? "Antaŭ pli ol 20 jaroj... fondite, CED preskaŭ ne okupiĝis pri la esplorado de la interlingvo-politikaj kondiĉoj..." (Mirinde! Ĉu ne?)

Ĉu vi sciis tion? "Multaj demandoj pri la interlingvo-politika situacio, la efike influantaj politikaj, sociaj, psikologiaj fortoj ktp devus esti analizataj, pri kiuj cetere ankaŭ 'Esperanto en Perspektivo' ne enhavas multon..." (Nekredinde! Ĉu ne?)

Ĉu vi sciis tion? "2. La esperantistoj decidu pri fokusoj kaj prioritatoj en sia politiko. Ne eblas fari ĉion samtempe. (Ho! ĉu vere?)

Ĉu vi ne sciis tion? "Estas ne kompreneble, ke en neniuj ŝtato, en neniuj granda organizaĵoj ĝis nun eĉ nur la ideo estis pripensita, ke Esperanto povus esti utila..." (Serce, sendube!)

Ĉu vi ne sciis tion? "4. La esperantistoj serĉu fortajn aliancinojn, kiaj estas politikistoj..." (Kia nova ideo!)

Ĉu vi ne sciis tion? "...Decidaj por la for-nado de la politika volo en tiuj grandaj in-

ternaciaj organizaĵoj estas la naciaj registaroj de la ŝtatoj-membroj... Jam sekve de tio la esperantistoj devintus tuj komenci intensz influ la naciajn registarojn. Tion la esperantistoj neglektis longan tempon..." (Neatendite! Ĉu ne?)

Ĉu vi ne sciis tion? "10. La esperantistaj landaj asocioj kaj la monda organizaĵo laboru principe 'de supre', en kio la monda organizaĵo kunordigu. La individuoj kaj la lokaj grupoj laboru principe 'de sube', en kio la landaj asocioj kunordigu..." (Kia surprizo!)

Kaj tiel plu... Unuvorte ĉio ĉi estas granda entrepreno por malfermi... jam malfermitajn pordojn!

—ooOoo—

Sed jen kio estas nova, tio estas la koncedo de la punto 11: "... Speciale grava kaŭzo, pro kiu iom akraj konfliktoj pri la interlingvo-politiko povas ekesti, estas la opiniaj diversecoj pri tio, kio estas neŭtraleca. Oni ne plu povas trakti tiun demandon en la sama maniero kiel antaŭe..." (Substreko mia). Jam per tio ni estas avertitaj pri la veraj tendencoj de la "nova vento"; sed plue venas pliaj asertoj, kiuj, se ankoraŭ persistas ia dubo, konfirmas definitive la koloron: "... La esperantistoj ne povas ne konsideri tiun situacion. Iliaj organizaĵoj en komunismaj landoj, ĉiam enigataj en ŝtatajn korporaciojn, ofte havas en siaj statutoj politikajn erojn, kiuj ne konformas al la opinioj en ne-kunismaj landoj. (Tamen nur de 1969 ekestis tia situacio! Antaŭe ne staris problemoj pri neŭtraleco.) Certe oni ne povas postuli, ke iliaj statutoj estu tiurilate ŝanĝitaj, kiam organizaĵo el orienta ŝtato volas aniĝi al UEA. Anstataŭe oni devos interpreti alie ol ĝis nun la paragrafojn 13 kaj 4 de la UEA-statuto..." (Substreko mia). Alikaze rezultiĝus kompleta disiĝo inter oriento kaj okcidento..." Alidire: por eviti la riskon de izoligo de la komunistaj asocioj, estas preferinde submeti sin al iliaj postuloj, t.e. kompromiti la asocion kaj komunistiĝi ĉiuj kune en "unu grandan rondon familian"! Kia konfeso! Ni ne forgesu 1933...

—ooOoo—

Kaj jen fine sekvas tuta pamfleto: in cauda venenum! Estas tiom pli facile ataki, kiam la atak-viktimo ankoraŭ ne disponas pri rebato-rimedo! "La modesta kaj senkosta reklamo, kiun d-ro Artur Bormann arogas al si oferi por HORIZONTO eĉ cinike "nur pro la kompleto kaj senparteco de raporto", estas ja nura ponardofrapo en la dorso je la profito de "la nova gvidantaro"!

Aparte subfosaj estas liaj esprimoj: "Orientofobio, komunistofagoj" (cetere kun kia vanta hiperbolo!!!), kaj liaj komentoj: "...Oni devas konscii, ke estas neeble, eĉ naive atendi, ke la esperantistoj superpontiĝos la ekzistantan politikan kontraŭon inter oriento kaj okcidento. (Ĉu temas pri tio?!!!) Se ili farus ion ĉirilatan, ili — la vere tre malgranda esperantistaro — provus ĝeni, ĝeneti la kunlaboradon ĵus interkonsentitan en Helsinko inter la ŝtatoj. Tio estus ridinda..." Verdire, kio do estas jam pli ol "ridinda"? Ĉu elvoki la interkonsenton de Helsinko, kredante kvazaŭ "naive" al piaj deziroj, dum jam en UEA mem — post la homoj — ne libere cirkulas eĉ la ideoj? Ĉu doni "naive" tiom da graveco al la "esperantistaro" eĉ se "tre malgranda"? Ja ĉio ĉi-supra strebis nur por alveni al jena deklaro (kvazaŭ sufiĉus nei por pravi!): "La dokumentado de L. estas sen iu serioza komento en tiu senco nur erariga, provoka, danĝera, kaj eĉ malutila por Esperanto." Ej! Ej! D-ro Artur Bormann, florojn nek pli nek plu ĵetu! Diru pli simple, ke vi estas komunisto aŭ havas simpatian al la komunistoj! Tiam ĉio estos pli komprenebla, pli lojala, pli sincera!

Jean Thierry

UNIKA OKAZO POR FILATELISTOJ KAJ KOLEKTANTOJ DE ESPERANTO-POSTMARKOJ!

Dank' al iniciato de kelkaj esperantistoj estis faritaj preparlaboroj por eldono de oficiala poŝtmarka Esperanto-serio. Ĉio kontentige progresis, kaj la serio estis eldonota de araba ŝtato en 1974. Pro la konataj hamburgaj eventoj la iniciatintoj kaj interesitoj rezignis pri la cetere bela serio, kaj tiu unika ideo ne realiĝis.

Tamen, por ebligi al precipe ĉiuj kolektantoj de Esperanto-poŝtmarkoj kaj al ĉiuj interesigantoj havigi al si tiun absolute unikan serion el filatela kaj movada vidpunktoj mi prizorgis la eldonon de faksimilo de la tuta serio de la ses poŝtmarkoj en originala koloro. La eldonkvanto estas limigita je du mil ekzempleroj. La vendoprezo estas 20 danaj kronoj aŭ egalvaloro. Profiti devos ja unue la Neŭtrala Esperanto-Movado. Tial: ĉiuj, kiuj mendos rekte ĉe mi, kontribuos per 10 d.kr. por ĉiu ekzemplero, al aŭ "Horizonto" aŭ la Neŭtrala Esperanto-Movado.

La serio konsistas el 3 portretoj: d-ro Zamenhof, H. Hodler kaj prof. Ivo Lapenna kaj 3 libroj: La Sankta Biblio, La Nobla Korano kaj Retoriko.

Kvankam ne temas pri "veraj" poŝtmarkoj (ĉar la serio ne lanĉiĝis), tamen ne kedu, ke ili, laŭ filatela vidpunkto, estas senvaloraj. Guste tiaj neeldonitaj aŭ nuraj projektoj havas tre ofte altegan valoron inter filatelitoj. Laŭ historia vidpunkto tiu ĉi serio estas unika en la Esperanto-movado!

Mendu ĉe: Peter Zacho, Amosevej 5 A, DK-2700 Brønshøj, Danlando.

Brazilo

En Rio de Janeiro aperis organizaĵo nomata "LAB-C-CIP" kiu celas grupigi entuziasmojn de la teatra ludarto, por serioze studi ĝin kaj elekti la plej bonan manieron disvastigi ĝin tra la civilizita mondo. Oni celas ankaŭ kunigi ĝin al aliaj artobranĉoj, kreante, per detala laboro, novajn metodojn de agado kaj novan teatran teknikon.

En la statuto de tiu organizaĵo estas rimarkindaj la litero "b" en la unua artikolo, kaj la tria artikolo, kiuj devigas la jenon: "Unue: Ĉiu elektota ĝenerala sekretario devas paroli kaj skribi sufiĉe bone Esperanton. Due: La lingvo elektita de "LAB-C-CIP" por la teatra interkomunikado eksterlande estas la universala, tio estas: Esperanto".

Kaj ili aldonas: Neniel oni akceptos aliajn idiomojn kiel ilon por komunikado.

FR Germanujo

25 jaroj SEL. — Je 1976-02-18 Sarlanda Esperanto-Ligo (Franz-Schubert-Str. 26, D-6602 DUDWEILER) celebros la 25-jaran datrevenon de sia fondiĝo. Tiukaze la gvidata de SEL Libroservo de la Neŭtrala Esperanto-Movado donos dum la tuta monato Februaro 1976, 10 % an rabaton al ĉiuj libroj. Interesiĝantoj petu katalogon de SEL.

Kultura Semajnofino de SEL. — Je 7/9 Majo 1976 Sarlanda Esperanto-Ligo (Franz-Schubert-Str. 26, D-6620 Dudweiler) okazigos sian 7-an Kulturan Semajnofinon en la konferencejo "Junkerwald" en Blieskastel-Niederwürzbach. La programon konsistigos tri kursoj: A (por komencantoj), B (por progresintoj sub gvido de Jean Thierry, Paris) kaj C (Esperanta tradukarto, gvidos Fernando de Diego, Zaragoza). Krome okazos katolika diservo en Esperanto kaj vingustumado. Detala invitilo kaj programo havebla ĉe SEL.

Hispanujo

Surbaze de la eksperimentoj I (lernojaro 1973/74) kaj II (lernojaro 1974/75)

okazintaj en Jugoslavio, Italujo, Bulgario, Aŭstrio kaj Hungarujo, kaj en Francujo, Belgujo, Nederlando, FR Germanujo kaj Britujo, respektive, grupo de geinstruistoj kaj gepatroj de lernantoj de Ĝenerala Baza Edukado (dua fazo), oficiale reprezentitaj de S-ro Miguel Manteca López, Jura registristo de propraj kaj Prezidanto de la Provinca Sekcio Esperanto, petis de la Provinca Delegacio pri Edukado kaj Sciencoj la enkondukon de Esperanto en la Naciaj Lernejoj de la provinco Alicante, kiel elektebla lingvo samrajte kun la franca kaj la angla.

La petskribo estis subskribita de Miguel Manteca, Francisco Zaragoza kaj 28 pliaj personoj.

Rumanio

S-ro Mihail Petro Dungeanu, de Suceava skribis leteron, en kiu dankinte pro la Deklaro de Principoj, li skribas: "Mi ekscias pri la ekzisto de NEM, kun kiu mi kaj miaj grupoj estas en plena akordo". Kore ni dankas s-anon Dungeanu, kiu ankaŭ pretas peri nian revuon en Rumanio.

Jugoslavio

Sub la nomo "Maja Voĉo", la revuo VOĈO organizas Literaturan Konkurson por mallonga rakonto verkita originale en Esperanto, kaj nenie antaŭe publike aperinta.

La premiojn prizorgos la lokaj instancoj kaj estas jenaj: I-a tre valora E-libro (nun "Esperanto en Perspektivo"); II-a oleopentraĵo de pentristo Danilo Banić; III-a du bonaj Eo-libroj (nun Libro pri falintaj jug. esperantistoj kaj "Nuda inter lupoj" de B. Apitz).

Prezidanto de juĝkomisiono estas s-ino Emilija Lapenna, longjara sekretariino de Belartaj konkursoj ĉe UEA, eksciiginta el tiu funkcio pro la eventoj en Hamburgo.

Regularon vi povas ricevi ĉe la suba adreso se vi aldonos 1 int. rpk. Limdato por sendi konkursaĵojn estas la 31-a de marto 1976, adreso: VOĈO monata E-revujo, 56223 Borovo Skolska ul. 25 Jugoslavio, indikante por L. K. "Maja Voĉo".

POSTMARKA KAMPANJO

Denove, nia kompetenta samideano S-ro Zacho komencis sian laboron kolektadi poŝtmarkojn kaj vendadi ilin je favoraj prezoj favore al Esperanto-movado. Nun lia laboro estas por finance helpi al HORIZONTO. La poŝtmarkojn bonvolu sendadi al jena adreso: Peter Zacho, Amosevej 5 A, DK-2700 Brønshøj. Pri la rezultoj de tiu ĉi Poŝtmarka Kampanjo aperados informoj en HORIZONTO.

Anticipan dankon al ĉiuj, kiuj kontribuos al Garantia Fondajo HORIZONTO aŭ helpos al la poŝtmarka kampanjo.

DEKLARO DE PRINCIPOJ

La 1.^a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, kunveninta en Saarbrücken de la 10a ĝis la 16a de Aŭgusto 1975,

REEKZAMENINTE en prelegoj kaj diskutoj la lingvan problemon en la nuna mondo kaj la pozicion de la lingvo Esperanto,

kaj konstatinte, ke la nuna gvidantaro de UEA ne plu agas laŭ la konceptaro, kiu ĝis la Hamburga politika puĉo ebligis disvastigi la lingvon,

DECIDAS memorigi al la esperantistaro jenajn principojn:

- 1) El ĉiuj projektoj de komuna lingvo nur Esperanto transformiĝis en vivantan lingvon de vivanta komunajo. Tiu komunajo havas la moralan devon konservi ekster ĉiu ajn alia ideologio la neŭtrale homan kulturan karakteron de la Zamenhofa Esperanto kaj de la humaneca internaciismo esence ligita al ĝi.
- 2) Tiucele fariĝis nepre necesa la estiĝo de internacia agad-grupo politike neŭtrala por plue disvastigi la lingvon kaj progresigi la movadon:
 - a) per aktivado surbaze de lokaj agad-grupoj, en kiuj la scipovo de Esperanto estas la fundamento de ĉiu ajn progreso;
 - b) per instruado de Esperanto en formo de kursoj parolaj, lernejoj kaj grupaj, perradiaj kaj perkorespondaj, kaj ankaŭ per plivastigo de memlernaj metodoj;
 - c) per ekstera aktivado por prezenti kaj defendi la lingvon, apogante sin sur la Principaro de Frostavallen kaj sur la dokumenta materialo de la ĝishamburga CED, enkondukante ankaŭ la nocion de "publikaj rilatoj" por konstante flegi la prestiĝan bildon de la Lingvo Internacia, de ĝiaj kulturo kaj komunajo, kaj instigi al lernado.
- 3) La internacia agad-grupo utiligos la rimedojn de komunikado interne de la Esperanto-Movado, interalie kaj precipe la novan periodaĵon "Horizonto", por diskonigi ĉi tiun deklaron de principoj kaj instigi al formiĝo de agad-grupoj kaj al aktivado laŭ tiuj ĉi principoj sur landa, regiona kaj loka niveloj.

ALVOKAS la esperantistaron —pro la nuna totaleca cenzurado de la vero en la organoj de UEA kaj en pluraj aliaj satelitaj periodaĵoj— profunde orientiĝi pri la veraj kaŭzoj de la nuna politikigo de la asocio.

Tiu politikigo ja klare pruviĝas el la kontroleblaj faktoj prezentitaj en la dokumento "Hamburgo en Retrospektivo".

ALVOKAS plie —pro la nuna malkonstruado en UEA— aktivi kaj en novaj agad-grupoj kaj en la ekzistantaj Esperanto-organizaĵoj konforme al tiuj principoj.

PROTESTAS kontraŭ la malveraj asertoj esprimitaj en la artikolo "Dangera ludo en Sarlando" ("Esperanto", 7-8/1975) pri la celoj kaj karaktero de la 1.^a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado. La neceson de tiu ĉi Konferenco kaŭzis la kontraŭstatutaj manovroj, kiuj kulminis en Hamburgo.

KOMISIAS la francan agad-grupon organizi en 1976 la 2-an Internacian Konferencon de la Neŭtrala Esperanto-Movado.

En la nomo de la partoprenantoj de la Konferenco:

Jean Thierry, prezidanto; Isaj Dratwer, vicprezidanto; Heinz Dieter Maas, vicprezidanto; Peter Zacho, vicprezidanto; Reinhard Haupenthal, sekretario.

NEMALHAVEBLAJ LIBROJ

FUNDAMENTO DE ESPERANTO. L. L. Zamenhof
(9-a eldono 1963)

LINGVAJ RESPONDOJ. L. L. Zamenhof (1859-1917)

PLENA ILUSTRITA VORTARO
PLENA VORTARO DE ESPERANTO

ĈEFVERKOJ KIUJ SIGNAS TUTAN EPOKON

Aŭtoro Ivo Lapenna

RETORIKO

Kun aparta konsidero al Esperantlingva parolarto
3-a eldono 1971

ELEKTITAJ PAROLADOJ KAJ PRELEGOJ
Libro, kiu kompletigas la verkon "Retoriko"

ESPERANTO EN PERSPEKTIVO

Faktoj kaj analizoj pri la Internacia Lingvo
(Ĉefredaktoro en kunlaboro kun U. Lins, redaktoro kaj T. Carlevaro)
CED, Decembro 1974

HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO

Dokumentoj kaj materialoj pri la kontraŭneŭtraleca politika konspiro en UEA
SEL, Junio 1975

Sub la marko STAFETO, la eldonisto J. Régulo prezentas en la serioj Belliteratura, Popularscienca, Movado kaj Beletraj Kajeroj, verkojn de plej elstaraj verkistoj kaj tradukistoj en la Internacia Lingvo, per kiuj evidentiĝas la kultura valoro de Esperanto.

... KUN SIASPECA SPICO!, R. Schwartz
NI kaj GI, Eseoj III, G. Waringhien
TOPAZE; LA SIPEGO "TENACITY", Elfrancigo de R. Bernard
LA ARBO DE LA SCIADO. Elhispanigo de F. de Diego
LA BELA SUBTERA MONDO. LIBRO PRI GROTOJ, L. Tell
LINGVO KAJ VIVO. ESPERANTOLOGIAJ ESEJOJ, G. Waringhien
LA ZAMENHOFA ESPERANTO, Diversaj aŭtoroj
ZAMENHOF, AŬTORO DE ESPERANTO, M. Boulton
JUNAGA VERKARO, E. Privat
ESPERANTA PROVERBARO, L. L. Zamenhof
ETA VIVO, C. Conterno Guglielminetti
CIELARKO, J. Baghy
OKULOJ, M. Boulton
CIGANA ROMANCARO, trad. F. de Diego
SOMERMEZNOKTA SONGO, trad. K. Kalocsay